



# EL POPOLA ĈINIO

中國報


9

1974





Ligiang-rivero en printempo (ĉinstila pentraĵo)



Kamaradino Vu Gujhan (la maldekstra) estas alterna membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPC kaj sekretario de la partia komitato de Ŝenhi-provinco. Jen ŝi instruas teknikon al junaj laboristinoj.

# Viglecplenaj Virinoj de Nova Ĉinio

Guo Fenglian (la dekstra), sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado en Hijang-gubernio de Ŝenhi-provinco, studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun la komunumanoj.



生命



在意识形态领域内两个阶级两种世界观的斗争更是激烈的

在意识形态领域内两个阶级两种世界观的斗争更是激烈的

知识青年上山下乡可耻



知识青年上山下乡可耻

知识青年上山下乡可耻

彻底批判孔老二




Laboristinoj de la Presa kaj Tinktura Fabriko en la urbo Ŝigiaguang, Hebej-provinco aktive partoprenas en la kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio.

Paraŝutistino de iu aerarmea trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo



Huang Hiujing (la maldekstra), membro de la partia komitato de Hilin-gubernio en Guanghi kaj sekretario de la partia filio de Mama-brigado, laboras kune kun mjaŭaj komunumanoj.





Ĉina fama obstetrika profesorino Ju Aifeng (la maldekstra) faras esploron pri ina seksa hormono kune kun siaj kolegoj. Nun ŝi laboras kie ĉi estro de la ginekologia kaj obstetrika sekcio de la Hospitalo sub la Tiangin-a Medicina Kolegio.



Lertaj fiŝistinoj de Davanŝan-insulo ekster la elfluejo de Perlo-rivero en Guangdong-provinco





Milicaninoj de Ulanhata-komunumo en la Interna Mongolio sin ekzercas en pafado por defendi la landlimon de la patrolando.





22-jara Vang Lingdi, vicestro de la ŝarĝa kaj malŝarĝa teamo en ŝanhaja doko

La amatoraj artistinoj de la Kultura Palaco de Ŝanhajaj Laboristoj provludas dancan.

Vu Venĝu (la maldekstra), instruistino de aera navigacio helpas komencantinojn lerni kalkuladon.





Gin Jueling, laboristino de la Sesa Vitrofarejo de Ŝanhajo kaj komponistino de la ĉina plej populara infankanto *Mi Amas Tian-anmen*, pordegon en Pekino, inter geknaboj



Junulinoj de malsamaj naciecoj laboras en la hidroelektra stacio de Nanmahe, Junnan-provinco.



# Kreskado de Ni

## Virinaj Kadroj

**P**OST la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, aperis en nia lando multe da virinaj kadroj. Ili laboras kiel gvidantoj de diversaj niveloj. Tio estas rezulto de disvolviĝo de virina movado de nia lando kaj grava signo de virina liberiĝo.

En la kultura revolucio, la malnovaj virinaj kadroj en la urbo Tiangin, same kiel en aliaj lokoj de la tuta lando, ricevis profundan edukon kaj fariĝis pli vigleplenaj. Samtempe, granda nombro da novaj virinaj kadroj estis elektita por fari gvidajn laborojn de diversaj niveloj. Inter 11 sekretarioj de la Tiangin-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio estas tri virinoj, kaj virinoj okupas 20% de la tuta nombro de ĝiaj komitatanoj. Multaj virinaj kadroj sane kreskas en ĉiuj urbaj distriktoj kaj antaŭurbaj gubernioj de Tiangin, en organizaĵoj de la Partio kaj registaro, en fabrikoj, minejoj, komunumoj, universitatoj kaj aliaj bazaj unuoj.

### FRUKTO DE LA PROLETA REVOLUCIO

La apero de tiel multaj virinaj kadroj absolute ne povas esti efektivigita en la batalo nur por akiri rajtojn por virinoj, sed estas frukto de venko de la proleta revolucio de nia lando.

En la malnova Ĉinio, vastaj laborantaj virinoj vivis en ekstreme malalta situacio. Ili ne havis rajtojn por partopreni en ordinara socia politika aktivado, por ne paroli pri la partopreno en administrado de ŝtataj aferoj. En pli ol du mil jaroj Konfucio, Mencio kaj iliaj disĉiploj distrumpetis, ke “por la virinoj manko de talento signifas virton”, por ke la virinoj fariĝu obeemaj “familiaj sklavinoj”. Ili eĉ publike diraĉis, ke “oni ne devas lasi virinojn partopreni en ŝtataj aferoj”. En la periodo de Kuomintang, la reakcia registaro dungis kelkajn oficistinojn, kiuj estis kaj helpantoj de reakcia klaso por subpremi la laborantan popolon, kaj ornamaĵo de t.n. “egaleco de viro kaj virino”. Tio estis afero tute

alia ol la vera liberiĝo de la laborantaj virinoj vivantaj en la mizera abismo.

La proletaro kun liberigo de la tuta homaro kiel sia misio nepre realigos veran emancipon de virinoj, kiuj konsistigas duonon de la tuta homaro. Lenin iam montris: **“La proletaro ne povas atingi plenan liberon, ne gajnante plenan liberon por virinoj”**, **“Iaŭ spertoj de ĉiuj liberigaj movadoj, venko de la revolucio dependas de tio, kiomgrade en ĝi partoprenas virinoj.”** Ankaŭ Prezidanto Maŭ montris: **“Kiam leviĝos la virinoj de la tuta lando, tiam venos la venko de la ĉina revolucio.”**

Kulturo de granda nombro da virinaj kadroj estas necesa rimedo por mobilizi milionojn da virinoj al revolucia batalo kaj socia produkto, kaj ankaŭ por akiri

virinan liberiĝon kaj revolucian venkon. Kiel eminentaj kaj spinaj elementoj de virinoj, kadroj estas ligiloj inter la Partio kaj virinaj amasoj. Ĉar ili havas naturan intiman rilaton kun vastaj virinoj, tial ili povas reprezenti, speguli opiniojn kaj postulojn de la vastaj virinaj amasoj, tio utilas por mobilizi ilin kaj konduki ilin antaŭen.

Ĝuste pro tio, la Komunista Partio de Ĉinio ĉiam donas grandan atenton al kulturado de virinaj kadroj. En sia Decido pri Kampara Laboro de Liberigitaj Regionoj en la jaro 1948, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio montris, ke oni devas aktive kulturi, senĝene uzi kaj promocii grandan nombron da virinaj kadroj en- kaj ekster-partiaj, asigni saman laboron kaj doni saman kulturen edukan ŝancon

*Aŭtoro de la artikolo Hing Janzi inter gejunuloj*



*Caj Ŝumej (la meza),  
estro de la Tiangin-a  
Virina Asocio kaj  
laboristino de Tiangin-  
a Kvara Kolorteksa  
Fabriko, instruas  
teknikon al juna la-  
boristino.*



al kadroj kaj kadrinoj, kiuj havas saman laborkapablon. En marto de 1949, antaŭvespero de la tutlanda liberiĝo, okazis la Unua Tutlanda Kongreso de Ĉinaj Virinoj. Ĝi montris, ke oni devas kulturi milionojn da kadrinoj por ke ili estu kompetentaj en diversaj laboroj por konformiĝi al situacio de venka disvolviĝo de la revolucio.

Post la Liberiĝo, la Partio foje-refoje emfazis tiun laboron. En aŭgusto de 1973 en la Deka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, kamarado Vang Hongven klare montris en la Raporto pri la Revizio de la Partia Statuto, ke oni devas “emfazi elektadon de elstaraj personoj el la laboristoj, malriĉkampanoj kaj mal-superaĵ mezkampanoj kaj meti ilin sur gvidajn postenojn de ĉiuj niveloj. Atento ankaŭ devas esti donita al kulturado de virinaj kaj nacimalplimultaj kadroj.”

Dank’ al la venko de nia demokratia revolucio kaj profunda disvolviĝo de socialisma revolucio gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, multe da virinaj gvidantoj de diversaj niveloj aperis el inter ni laborantaj virinoj kiuj sin trovis antaŭe en senrajta stato.

## ANTAŬENMARŜI EN BATALADO

Ankaŭ en la problemoj kulturi virinajn kadrojn ĉiam ekzistas akra batalo inter la du klasoj kaj du linioj. La ĉefoj de la reviziisma linio Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj similaj heredis tezojn de Konfucio kaj Mencio kaj predikis, ke “virinoj estas postĝinitaj” kaj “virinoj estas senutilaj” por subtaksi kaj nei virinan rolon en revolucio kaj konstruado. Ĉar tiuj reakciaj pensoj ankoraŭ ne estis tute eliminitaj, tial ankaŭ iuj el la popolamasoj opiniis, ke virinoj havas “malaltan klarecon, malmultan laborkapablecon kaj pezan ŝarĝon”.

Ĉu al virinoj vere mankas kapablo? Kio estas kapablo? Marksismo opinias, ke kapablo de la homo ne estas denaska, sed akirita iom post iom en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. La vera scio venas de praktiko, la kapablo — de batalo. Ĉu la virinoj estas denaske malpli kapablaj ol la viroj? Ne, tute ne. En miloj da jaroj de feŭda regado, la virinoj estis katenitaj en hejmo kaj ne povis partopreni en diversaj sociaj aktivadoj, tial en la komenca periodo post la Liberiĝo iliaj

socia scio kaj sperto estis malpli multaj ol la viraj. Ĝuste pro tio, kulturaj virinojn fariĝis grava problemo. Post la Liberiĝo, la Partio kaj la popola registaro kreis por la virinoj bonajn kondiĉojn por lerni revolucionan teorion, entrepreni revolucionan batalon kaj lerni legoscion, sciencojn kaj teknikon, tiel ke ilia kapablo rapide kreskis kaj plene disvolviĝis. Kaj el ili senĉese aperis multaj elstaraj kaj kapablaj personoj.

En nia Tiangin troviĝas multaj tiaj ekzemploj. Vang Ŝuĝen devenis de malriĉa familio kaj laboris en la Kvara Kotonŝpinaĵo de Tiangin. Antaŭ la Liberiĝo, ekde la aĝo de naŭ jaroj, ŝi devis labori por kapitalisto kiel infanlaboristino. Post la Liberiĝo, ŝi diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj samtempe direktis sin per Maŭzedongpenso. En la jaro 1958,

konforme al granda impeto de produkto, ŝi disrompis malnovan rutinon difinitan en fremdlanda teknika libro, ke revolucio de spindeloj ne povas superi limigitan rapidecon, persistis en eksperimentado sur sia maŝino kaj kune kun aliaj laboristoj, kreis kompletan da novaj manipulaĵoj por atingi altan rapidecon. Ŝi estis elektita kiel labormodelo de la urbo Tiangin en sinsekvaj naŭ jaroj. Nun ŝi laboras kiel sekretario de la partia komitato de la urbo kaj samtempe kiel sekretariino de la urba komitato de Komunisma Junulara Ligo.

Same tiel estas en la kamparo. Post sia diplomigo el la supera mezlernejo de Pekino, Hoŭ Gjun, pri kiu ni jam raportis en nia gazeto, venis al la kamparo en la jaro 1962 por tie fiksloĝiĝi. Ĉar ŝi ne timis

*Intelektula junulino fiksloĝanta en kamparo Hoŭ Gjun, partifilia sekretario de Doŭgia-brigado, interkonsiliĝas pri laboro kun membroj de la partia filio.*



*Liu Cujing (la dekstra), sekretario de la partia filio de la Kemia Fabriko Hongguang de Tiangin, laboras kun aliaj.*



malfacilojn kaj modeste lernis de veteranaj kamparanoj, tial ŝi rapide ellernis multajn agrikulturajn sciojn kaj povas plenumi diversajn kamplaborojn. Krome, ŝi ankoraŭ spertis seriozan provadon de klasbatalo. En la jaro 1964, kontraŭrevolucia reviziisto kaj ĉefo de la nigra linio de kulturo kaj arto Ĝoŭ Jang dufoje iris al la vilaĝo, kie ŝi laboras kaj loĝas, por forlogi ŝin forlasi la kamparon kaj fariĝi “verkistino” per burĝara “renomiĝo” kaj “bona estonteco”. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, plenmano da klasaj malamikoj intrige instigis iujn el intelektaj junuloj fiksloĝiĝintaj en la kamparo reveni al la urbo. Kune kun la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ŝi frakasis la atakon de la malamikoj, kaj pli firme decidis resti en la kamparo por iri la vojon montritan de Prezidanto Maŭ. Dank’ al hardado de revolucio kaj produkto, multe altiĝis ŝia politika nivelo kaj laborkapablo. Nun ŝi estas vicsekretario de la partia komitato de Baŭdigubernio.

Kial multaj virinaj kadroj povas rapide altigi sian kapablon? Krom ke ili partoprenas en praktiko la kaŭzo kuŝas ankaŭ en tio, ke ili serioze lernas revoluciajn teoriojn. Veterana laboristino Liu Gingjing, membro de la partia komitato de la Dua Lanŝpinejo de Tiangin, ne vizitis lernejon antaŭ la Liberiĝo. En la jaro 1958, ŝi kaj aliaj malnovaj laboristoj de la fabriko organizis grupon por lerni filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Dank’ al ilia ekzemplo laboristoj de la tuta urbo levis varman tajdon de lerno de filozofio. Ŝi lernis kaj legoscion kaj teorion frumatene kaj vespere. Post longtempa diligenta lernado ŝi pli bone posedis fundamentajn vidpunktojn de Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso kaj samtempe povas direkti sian agon per la lernita revolucia teorio. Ekzemple, laŭ la vidpunkto de dialektika materiismo “praktiko estas la unua”, ŝi ĉiam atentis enketi realan staton por posedi primarajn materialojn. La fabriko decidis plimultigi novajn produktaĵojn. Sed kiaj produktaĵoj estas urĝe

bezonataj de laborantaj popolanoj? Por scii tion ŝi organizis enketan grupon kaj iris al magazeno por tie labori kiel vendistoj kaj al kamparo kaj fiŝvilaĝo por kolekti opiniojn ĉe laboristoj kaj kamparanoj pri produktaĵoj de la fabriko, tiel ke la fabriko senĉese produktas novajn specojn ŝatatajn de amasoj.

## ZORGO KAJ KULTURADO DE LA PARTIO

Ĉiam kiam mi kaj aliaj kadrinoj kune rememoras nian kreskadon, ni kun emocia koro ekparolas pri zorgado kaj kulturado de la Partio.

En 1958, post la diplomiĝo de la mezlernejo mi venis al la kamparo de Baŭdi-gubernio por tie fiksloĝiĝi. Tiam mi estis nur 17-jara kaj pensis en mi: "En kamparo fondiĝis la popola komunumo. Mi devas kontribui mian forton por konstrui novan socialisman kamparon, respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ **Ĉiuj intelektuloj, kiuj povas labori en la kamparo, devas ĝoje iri tien.**" Mi do decidis forlasi la gepatrojn loĝantajn en la urbo kaj iri al la kamparo.

De tiam la partia organizo ĉiam zorgas kaj helpas min. La sekretario de la komunumo multfoje kuraĝigis min por ke mi starigu decidon por ŝanĝi postĝintan fizionomion de la vilaĝo, kie mi fiksloĝiĝis. En la lastaj pli ol dek jaroj, mi vivas kaj laboras kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, dume mi lernas de ili. Ni kune venkis gravajn naturajn katastrofojn, reformis grundon kaj faris akvoutiligan konstruaĵon. Dank' al nia diligenta laborado la brigado, al kiu antaŭe mankis greno, nun ĉiujare povas vendi pli ol 100 tunojn da superflua greno al la ŝtato.

Kiam mi atingis iom da sukcesoj en laboro, la partia organizo ĉiam entuziasme kuraĝigis min por ke mi senĉese progresu; kiam mi faris eraron, ĝi tuj kritikis kaj helpis min. En la jaro 1973, post kiam mi

eklaboris kiel vicsekretario de la partia komitato de la gubernio Baŭdi, la malnovaj sekretario kaj vicsekretario de la partia komitato de la gubernio persone kondukis min al la komunumoj kaj produktaj brigadoj por ke mi konu la realan staton, kaj samtempe detale prezentis al mi laboran metodon. La partia organizo aranĝis por mi multajn lernajn ŝanĉojn. Ekzemple, mi iam estis sendita por speciale lerni fundamentan teorion de Marksismo-Leninismo. En la jaro 1973, kiel membro de la Delegacio de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio, mi vizitis Japanion, kio havigis al mi ŝancon por lerni de la japanaj popolo kaj laborantaj virinoj.

En la lastaj jaroj, mi kvinfoje feliĉe vidis nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, kiam mi partoprenis en kunvenoj kaj celebrado de la Nacia Festo en Pekino. Precipe en decembro de 1964, kiam mi ĉeestis la Trian Tutlandan Kongreson de Popolaj Rerezentantoj, Prezidanto Maŭ aranĝis bankedon por herooj kaj modeloj de diversaj frontoj. Prezidanto Maŭ kun rideto svingis al ni manon por ke ĉiuj sidiĝu, kaj samtempe alvokis min kaj alian intelektan junulon laborantan en kamparo por ke ni sidiĝu ambaŭflanke de li. Li intime interparolis kun ni kaj sincere esperis, ke ni estu modestaj kaj neniam forlasu fizikan laboron kaj la amasojn, post kiam ni fariĝis kadroj.

Kiam mi rememoras tiujn scenojn, mia koro neniel povas kvietiĝi kaj sentas senkomparan varmon. Ĉio ĉi tio montras, ke Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio tre zorgas la kreskon de ni gejunuloj kaj kulturadon de ni virinaj kadroj. Ni laborantaj virinoj povas havi hodiaŭan feliĉon nur en la socialisma nova Ĉinio gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio.

---

*\*Hing Janzi estas sekretario de la partia komitato de la urbo Tiangin kaj vicsekretario de la partia komitato de la gubernio Baŭdi.*

# Pri la batala vivo de laboristinoj de la Ŝanhaja 22-a Kotona Tekstila Fabriko

**L**A laboristinoj de la nomita fabriko skribis gloran batalan historion por la ĝisfunda emancipiĝo de virinoj antaŭ la Liberiĝo, kaj senĉese faras novajn kontribuojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado post la Liberiĝo.

## ABISMO DE SUFERO

Ĉie en la nomita fabriko, oni povas vidi dazibaojn skribitajn de la laboristinoj, en kiuj ili varme prikantas sian feliĉan vivon kaj la socian pozicion kaj rolon de la virinoj de la nova Ĉinio en la socialisma sistemo, indigne kritikas la krimojn de Lin Biaŭ kiu klopodas restaŭri kapitalismon imitante Konfucion predikantan “sinregi por restarigi la etiketon” kaj kritikas Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ k.s., kiuj distrumpetis la konfucianismon “viroj estas noblaj kaj virinoj plebaj”, malestimis virinojn kaj subtaksis iliajn rolojn. La laboristinoj de tiu ĉi fabriko neniel povis retenigi indignon rememorante la malnovan Ĉinion makulitan de sango kaj larmoj. Ili diris, ke la laborantaj virinoj tiam suferis ne nur subpremadon kaj ekspluatadon de ekspluatataj klasoj same kiel viroj, sed ankaŭ perseku-

tadon de konfucianismo “viroj estas noblaj kaj virinoj plebaj”, de pli ol du mil jaroj; la laborantaj virinoj havis nenian rajton por partopreni en socia aktivado kaj estis humilaj eĉ en sia familio.

La 22-a kotona tekstila fabriko kun la historio de 84 jaroj antaŭe estis nomata la 9-a Kotona Tekstila Fabriko Ŝenhin. Por ĉasi pli da profitoj, la kapitalistoj varbis grandan nombron da infanlaboristinoj kaj kontraktaj laboristinoj. Tiuj havis nenion da salajro kaj multaj el ili mortis sub la laŭplaĉa bato kaj insulto de kapitalisto kaj protoj, peza laborado de pli ol dek horoj en ĉiu tago kaj malbonaj vivkondiĉoj. Ankaŭ ordinara laboristinoj suferis tute same kiel infanlaboristoj kaj kontraktaj laboristinoj krom iom da salajro kiu nur povis teni minimuman vivon. En tiu tempo, tute ne troviĝis sekurigaj aranĝoj en la laborado, tial laboristinoj ofte svene falis en laborejo kaj iuj el gravedulinoj eĉ abortis pro laciĝego. En la fabriko ankaŭ la rajteco inter viraj kaj virinaj laboristoj estis neegala, viroj havis salajron pli altan ol tiu de virinoj de sama laborspeco. La kapitalisto speciale konstruigis “zigzagan ponton” traireblan por unu persono, kaj kiam laboristinoj ĝin



*Laboristinoj indigne kritikis konfucianismon distrumpetitan de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ pri diskriminacio al la virinoj.*

trapasis post laboro, ili estis molestitaj de la fabriko per korpopripalpo.

La suferplena historio de Kian Ĵujfen estas miniaturo de laboristinoj suferintaj kruelajn subpremon kaj ekspluaton de kapitalistoj en la malnova socio. Pro malriĉeco de sia familio, naŭjara ŝi fariĝis kontrakta laboristino en iu kokonelbobenejo. Je la templimo de ŝia kontrakto, la kapitalisto forpelis ŝin el la fabriko por suĉi sangon al novaj kontraktaj laboristinoj (ĉar post la kontrakta periodo de laboro la fabriko devis salajri ilin). Poste, por sin vivteni, ŝi devis refoje fariĝi kontrakta laboristino en la 9-a Kotona Tekstila Fabriko Ŝenhin en Ŝanhajo. La laboristinoj faris pezan laboron, sin satigis per

suposimila rizkaĉo kaj suferis vipadon de kapitalistoj kaj protoj. Ĉu dekelkjaraj knabinoj povis elteni tian longtempan torturadon? En malpli ol du jaroj mortis de malsano dekelkaj el la fratinoj kiuj samtempe kun ŝi eklaboris en la fabriko. Poste, ankaŭ ŝi grave malsaniĝis kaj la kruela kapitalisto forpuŝis ŝin el la fabriko, kiam ŝi estis faranta la lastan spiron. En la jaro 1945, venkis la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo. Je tio, Ĵujfen pensis ke la tagoj eble pliboniĝos kaj ŝi denove venis al la 9-a fabriko Ŝenhin. Sed la subpremado kaj ekspluatado de kapitalistoj al laboristoj estis tute samaj kiel antaŭe. La peza laboro gravigis ŝian malsanon kaj nur post la Liberiĝo de



Ŝanhajo, ŝi estis resanigita kaj akiris novan vivon dank' al la zorgo de la Partio kaj la registaro.

## KURAGAJ EN BATALO

La ĉinaj virinoj kuraĝe sin ĵetis en la batalon kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong iam montris: **“Virinoj okupas duonon de la loĝantaro. La ekonomia pozicio kaj la stato de aparta subpremteco de la laborantaj virinoj pruvis ke virinoj ne nur urĝe bezonas la revolucion sed ankaŭ estas unu el la fortoj decidantaj venkon de la revolucio.”** La instruo de Prezidanto Maŭ montris ĝustan vojon por la ĉinaj virinoj en ilia batalo por la ĝisfunda emancipiĝo. La laboris-

tinaj komprenis el sia travivaĵo, ke la subpremo suferita de la laborantaj virinoj estis tiu de klaso, kaŭzita de la ekspluata sistemo, kaj ke la laborantaj virinoj nepre devas partopreni en revolucia batalo se ili volas akiri emancipiĝon.

En printempo de 1948, antaŭ la liberiĝo de la tuta Ĉinio, la laboristinoj de la 9-a tekstila fabriko Ŝenhin disvolvis sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio grandiozan batalon kontraŭ malsato. Tagmeze de la 30-a de januaro, en la difinita tempo la laboristinoj haltigis la ŝpinmaŝinojn kaj teksmaŝinojn de la tuta fabriko, tiel ke la fabriko dronis en paralizo.

La strika batalo daŭris tri tagojn kaj noktojn. Malsukcesinte en minaco kaj allogo per profito, la kuomintanga reakcia

*Vicsekretario de la partia komitato de la fabriko Baŭ Gintjan (la meza) interparolas kun laboristinoj en laborejo.*



registaro sendis je la mateno de la 2-a de februaro pli ol tri mil armitajn militpolicianojn kaj plurajn kirasaŭtojn por freneze subpremi la laboristinojn kaj eĉ pafis per mitraloj. Tamen la laboristinoj ne surgenuiĝis nek timis antaŭ la malamikoj. Per brikoj, ferstangoj, oletamburoj kaj lignobastonoj ili forpelis la malamikojn. Kiam la malamikoj sturmis la trian pordegon de la fabriko, laboristoj ekveturigis aŭton antaŭen por bari la malamikajn kirasaŭtojn. Kaj kiam la malamika kirasaŭto entrudiĝis en la trian pordegon, kelkaj laboristinoj sentime kuŝiĝis antaŭ ĝi. La sentima ago ŝtonigis la malamikojn. Poste, la reakciaj militpolicianoj puŝis la laboristinojn per policbastono kaj pafilkolbo, la laboristinoj do brako en brako formis homan muron. Ili persistis en batalado laŭte kriante sloganon "Unuiĝo estas forto!"

La justa batalo de la laboristinoj ricevis vastan subtenon de la diversaj rondoj de

Ŝanhajo kaj estis orlitere enskribita en la historion de la ĉina laborista movado. La batalo pluapaŝe hardis la vastan laboristinaron kaj revolucian popolon kaj pliardigis la revolucian flamon. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo faris longtempan armitan batalon kaj fine renversis la tri montegojn subpremantajn sur sia kapo, kaj la laboristinoj de la 9-a fabriko Ŝenhin kaj la aliaj laborantaj virinoj de la tuta lando akiris emancipiĝon.

### SENHALTA ANTAŬENMARŜO

La starigo de la socialisma sistemo malfermis vastan perspektivon por ĝisfunda emancipiĝo de virinoj. La konstitucio, leĝo kaj serio da politikoj ellaboritaj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro garantias, ke la virinoj ĝuas rajtojn egalajn al tiuj de viroj en politiko, ekonomio, kulturo, socio, familia vivo k.a.



*Maljuna laboristino instruas al junaj laboristinoj produktan teknikon.*

Laŭ la difino de la ŝtato, la fabriko faris multajn konkretajn aranĝojn por sekurigi virinojn en laborado, kaj donas apartan zorgon al ili en la periodo de ilia gravedo, akuŝo kaj mamnutrado. Tre emociiĝis la maljunaj laboristinoj de la fabriko kiam ili rememoris pri la pasintaj suferplenaj tagoj kaj vidis la radikalan ŝanĝiĝon de stato de la virinoj post la Liberiĝo.

Ili havas la komunan komprenon: Sen la Partio, sen Prezidanto Maŭ, sen la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ne estus la hodiaŭa emancipiĝo de la ĉinaj virinoj. Ankoraŭ freŝe restas en ilia memoro, ke printempe de 1956, en la grava momento de la socialisma reformo al kapitalismaj industriaj kaj komercaj entreprenoj de la tuta lando, Prezidanto Maŭ Zedong inspektis tiun ĉi fabrikon. Ĉiuj laboristinoj multe suferantaj en la malnova socio ek-larmis de emocio kiam ili unuafoje vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ

Zedong. La kora zorgo kaj instruo de la granda gvidanto fariĝis giganta movforto kuraĝiganta ilin fari socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon kaj senĉese gajni novajn venkojn.

Sub la kulturo kaj eduko de la Partio, la laboristinoj de la fabriko pluapaŝe komprenis, ke virinoj devas sin dependi de propraj klopodoj por sia ĝisfunda emancipiĝo. Varme responde la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ Zedong **“unuiĝu kaj partoprenu en produktado kaj politika aktivado por plibonigi la ekonomian kaj politikan staton de virinoj”**, ili aktive partoprenis en demokratia reformado, movado kontraŭ kvin krimoj (subaĉeto, imposta fraŭdo, ŝtelo de ŝtataj materialoj, produktado per malbonaj materialoj, ŝtelo de ekonomiaj informoj de la ŝtato), socialisma reformado al kapitalismaj industriaj kaj komercaj entreprenoj kaj batalo kontraŭ dekstruloj de la fabriko. En la Granda Proleta



*Labormodelo Gaŭ Ĝendi en studado de Marksismo-Leninismo kaj verkoj de Prezidanto Maŭ*

Kultura Revolucio, ili malkaŝis la kontraŭ-revoluciajn agojn faritajn de Liu Ŝaŭki en la fabriko en 1957, kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ k.s. kaj per tio pluapaŝe altigis sian konscion pri klasbatalo kaj linia batalo. Multaj el ili estas promociitaj al gvidaj postenoj de diversaj niveloj en la fabriko. En la jaro 1953, en la fabriko troviĝis nur 28 oficistinoj, tamen nun jam pli ol 300 kadrinoj, kiuj okupis duonon de nombro de la tutfabrikaj kadroj. El la partia komitato de la fabriko, plejparto estas kadrinoj. La antaŭa laboristino Baŭ Ginjuan de prilaborejo estis promociita al vicedestro de la revolucia komitato de la fabriko en 1969 kaj poste elektita kiel vicsekretario de la partia komitato de la fabriko pro ŝia alta konscio de la linia batalo kaj aktiva laborado en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Revolucio liberigis produktan forton. Sub la konduko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la laboristinoj de la tuta fabriko aktive sin ĵetis en socialisman konstruadon kaj el ili aperis multaj avangarduloj. Ekz., laboristino Ĝaŭ Ĝendi ĉiam metas la kvaliton en la unuan lokon en produktado kaj kreis kompletan da nova metodo por ŝpinado de maldikaj fadenoj, kio faris grandan kontribuon por altigi la kvaliton de produktaĵoj, kaj ŝi gajnis gloran titolon de ruĝa standardisto "la Oka de Marto" de la tuta lando. De la Granda Proleta Kultura Revolucio, gelaboristoj de la fabriko pluapaŝe disvolvis teknikan renovigon, kaj jam faris pli ol 100 teknikajn renovigojn nur en la jaro 1973. Ili reformis la originajn ekipaĵojn

kaj efektivigis aŭtomatigon en kotonpurigado kaj ŝpinado de dikaj kaj maldikaj fadenoj k.a. multaj procedoj, kio altigis laborefikon.

Por bone fari la revolucion en la kampo de superstrukturo, la laboristinoj de tiu ĉi fabriko starigis laboristan propagandan taĉmenton, kiu venis al la Ŝanhaja Hinhua-hospitalo por tie helpi laboron. Nelonge post ilia alveno, oni alsendis junan laboriston frapitan de elektro. Lia koro ĉesis bati jam 23 minutojn. Sub la kuraĝigo kaj helpado de la laborista propaganda taĉmento, la kuracistoj de la hospitalo venkis diversajn malfacilojn kaj fine revivigis tiun ĉi junan laboriston. La kuracistoj diris: "La kuraĝigo de la laborista propaganda taĉmento ludis grandan rolon en nia kuraco. La revivigo signifas la venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ."

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio, precipe en la batalo de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la laboristinoj profunde komprenis: Ankoraŭ granda estas la influo de la penso malestimi virinojn kaj la ideologio de ekspluatataj klasoj, kaŭzita de la dumiljara feŭda regado. Por akiri ĝisfundan emancipiĝon de virinoj, oni devas ĝisfine konduki la socialisman revolucion en la ideologia kampo. Firme tenante en sia memoro la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "**la vera egaleco inter la viroj kaj virinoj povas esti realigita nur en la procezo de la socialisma transformo de la tuta socio**", ili decidis batali por ĉiam sur la vojo de daŭra revolucio por la ĝisfunda emancipiĝo de la virinoj.

# Elektristino Ĝang Min

**I**NTENSA laborado iras sur ultratensia linio kun kurento. Jen juna elektristino provizita per protekta ekipaĵo lerte grimpis sur la tisturon kaj eniris en la elektran kampon. Alproksimiĝinte al la drato, ŝi kaptis mane la draton kun tensio de 220,000 voltoj kaj komencis sian laboron.

La 20-jara elektristino nomiĝas Ĝang Min. Kiel ordinara laboristino de la Elektra Buroo de Anŝan, ŝi estis elektita antaŭnelonge kiel vicsekretario de la Anŝan-a Komitato de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo.

Antaŭ kelkaj jaroj ŝi ankoraŭ estis mezlerneĵano. Kiel ŝi ekamis la profesion de elektra laboristo kaj en mallonga tempo ellernis la teknikon de libera laboro sur linio sub tensio?

## DEZIRO

Foje kiam ŝi estis mezlerneĵano, la lernejo aranĝis por la lernantoj pririgardon de libera laboro sur linio sub tensio. Sur altensia linio kun kurento, kiu kondukas al iu minejo, elektristoj urĝe laboris. Sidante sur herbejo Ĝang Min kaj aliaj lernantoj treege streĉite rigardis supren al ili. Kiam kelkaj laboristoj eniris la ultratensian elektran kampon, la drato disĵetis sparkojn kun krakoj. Forte batis la koro de Ĝang Min. Ŝi vidis, ke iu laboristo kaptis per mano draton kaj senĝene ŝanĝis unu difektitan pecon el porcelana ĉenizolilo per nova. Ŝtono defalis de ŝia brusto nur kiam la laboristoj forlasis la draton kaj revenis sur la teron.

La grava teknika renovigo efektivigita de la ĉinaj laboristoj, kadroj kaj teknikistoj, kiu ebligas sekuran kontroladon kaj riparadon de elektra linio kaj aliaj elektraj ekipaĵoj sen rompo de la kurento, evitas ĉesigon de produktaj laboroj. La vidita

mirinda spektaklo kaj la revolucia spirito de la elektristoj forte impresis ŝin kaj tio kvazaŭ mistera semo eniĝis profunde en ŝian koron. Kiel bele estos, se mi fariĝos elektristino por plenumi similan laboron, ŝi pensis en si. La socialisma konstruado de la patrolando senĉese progresas kaj certe ĉiam plimulte da elektristoj estas bezonataj.

## HARDIĜO

Post la fino de studo en la mezlernejo, laŭ ŝia deziro la organizo destinis al ŝi laboron de elektristo eksterdoma. Tio estis granda ĝojo por ŝi, kaj ŝi estis varme akceptita de la veteranaj laboristoj. Iuj el ili diris al ŝi: "Brave, knabino! Tamen la laboroj de eksterdomaj elektristoj estas tre penigaj, kaj oni devas esti pretaj labori sub ĉielo en ĉiu momento laŭ bezono, ĉu en noktomezo aŭ en pluvo kaj vento." La estro de la laborgrupo demandis ŝin: "Ĉu vi havas kuraĝon surgrimpi turojn dekojn da metroj altajn?" Rigardante la vizaĝon multe spertintan de la demandinto, ŝi firme respondis: "Ju pli malfacila estos la laboro, des pli bone ĝi hardos min. Sub gvido de vi veteranaj majstroj, mi havas nenion por timi!" La maljuna grupestro serene ridis: "Bone, mi do akceptas vin kiel mian metilernanton."

Post nelonge Ĝang Min jam ellernis la elementajn teknikojn de elektristo, sed ŝia majstro ankoraŭ asignis al ŝi nur helpajn laborojn sur la tero. Foje ŝi petis la permeson de la majstro, ke ŝi surgrimpu la turon kaj ekpalpu la draton. Sed la lasta diris al ŝi pensige: "Ne malestimu tiujn malgravajn laborojn kiel transdoni instrumentojn k.a. Lernu unue pritrakti ĉiujn etajn aferojn." De tiam Ĝang Min faris surterajn laborojn pacience kaj kon-

science kaj samtempe donis atenton por ekposedi la bonajn pensojn kaj bonan stilon de tiuj veteranaj laboristoj.

Foje, dum intensa neĝado, Ĝang Min sentis malvarmon kaj venis al ŝi la penso: “Kiel bone estas, se eblus trovi iun angulon por iom varmiĝi.” Sed kiam ŝi levis sian kapon kaj vidis, ke iu veterana laboristo ja laboras streĉe sur latisturo kun dika neĝtavolo sur siaj ĉapo kaj vesto, kaj por agi pli libere, li eĉ demetis siajn gantojn por frot-purigi la porcelanan ĉenizolilon per manplato. Ĝang Min ekpensis en si: “Jen kia diferenco en la pensado inter mi kaj la majstroj!” Tiel pensante ŝi ekhavis novan forton kaj eklaboris kun pli da energio.

Post kelka tempo, la majstro diris al ŝi: “De hodiaŭ vi do ekzercu vin por surgrimpigi turojn.” Ĝang Min tuj iris al la turo kaj ekgrimpis. Atin-ginte ĝian mezon ŝi levis la kapon kaj vidis ŝve-bantajn nubojn kaj ŝajnis al ŝi, ke la turo iom ek-skuiĝas. Sed ŝi pensis: “Kia elektristo sen kuraĝo por surgrimpigi turon!” Ŝi do plene streĉis sian forton kaj rapide daŭrigis la grimpadon ĝis la supro de 30-metra turo. Poste ŝi surgrimpis ankaŭ 50- kaj 70-metrajn turojn kaj fariĝis pli kaj pli kuraĝa kaj lerta en grimpadon.

## RIGORA MAJSTRO

Ke Ĝang Min jam povis surgrimpigi 70-metran turon, tio tre ĝojigis ŝian majstron. La lasta do tuj laborigis ŝin pri fiksado de porcelana ĉenizolilo sur linio sen kurento. Tiu laboro estas pli malfacila ol la surgrimpado. Kvazaŭ stakoj da pelvoj, la ĉenizolilo balanciĝis en la aero. Ŝi pensis: “Ĉu tiuj eltenos la pezon de homo? Ĉu oni ne glitos sur ili?” Ŝia majstro ekzemplis por ŝi agmanieron kaj ripete atentigis al ŝi, ke ŝi ne palpu pli ol

tri porcelanajn pecojn de la ĉenizolilo. Ĝang Min kuraĝe surpaŝis la ĉenizolilojn. La majstro instruis al ŝi, ke ŝi rajde kunpremu la ĉenizolilon per la gamboj por labori per la liberigitaj manoj. Ŝi iom post iom liberigis unu manon kaj ekfrotis porcelanajn pecojn. Ŝi rapide ellernis tiun laboron, kaj kun ĝojo de sia nova sukceso, ŝi palpis sinsekve 5 porcelanajn pecojn. Tion vidinte la majstro tuj ordonis ŝin malsupreniri.

Ĝang Min ne komprenis la kaŭzon kaj eĉ petis partopreni en laboro sur linio sub tensio en la sekvanta tago. La maljuna grupestro tion rifuzis, svingante la manon: “Ne! Vi devas unue peni por havi teoriajn sciojn. Linia laboro sub tensio postulas rigoran sciencan sintenon.” Li komencis klarigadon al ŝi kun pacienco: “Elektro mortigas homojn. Sed, se homo kaj la elektrita objekto estas en egala potencialo, nenia kurento trakuras la homon. En nia nuna metodo de linia laboro, oni ja utiligas tiun principon. Se oni palpas sinsekve 5 porcelanajn pecojn de ĉenizolilo, tio eble kaŭzos kurtan cirkviton, kio endanĝerigas la vivon. Vi neniam forgesu tiun ĉi principon, dum via laboro!”

Ĝang Min ekkonsciis pri sia malatentemo kaj de tiam pli diligente studis teorion kaj ekzercis sin peneme en manipulado laŭ tre rigoraj normoj. Post nelonge, estis fine permesite al ŝi partopreni kun la majstroj en linia libera laboro sub tensio.

Nun Ĝang Min jam estas sperta elektristino pri tiu laboro. Kvankam ŝi funkcias nun kiel vicsekretario de la Anŝan-a Komitato de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, tamen, ŝi ne forlasis sian amatan laborpostenon. Ĉu en frosta vento aŭ sub arda sunbrilo, ŝi persistas en kontrolado kaj riparado de elektra linio kune kun aliaj elektristoj, por kontribui sian forton al la elektra afero de la patrolando.



*Ĝang Min (la dua de dekstre) kaj aliaj kamaradoj studas progresintan teknikon pri laboro sur ultra-tensia linio sen rompo de kurento.*



*Baj Kihian kritikis kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio en la kunveno okazigita de Jancun-mezlernejo.*

## Rompo kun Malnovaj Tradiciaj Ideoj

**P**OST sia diplomiĝo studentino Baj Kihian memvole iris en la kamparon kaj tie edziniĝis kun ordinara kamparano.

La afero levis du malsamajn opiniojn: Plejparto de la komunumanoj forte laŭdis la faron, sed iuj aliaj mokis ŝin.

Kial aperis tiuj tute malsamaj opinioj? En sia letero al la provinca ĵurnalo de Hebej, Baj Kihian skribis:

“Mia starpunkto estas malsama al tiu de iuj homoj (kiuj malaprobis ŝian edziniĝon kun kamparano — la Red.). Mi kaj ili pensas malsame kaj ne povas kompreni unu la alian. Iuj sentis la vivon en la kamparo malkomforta, sed mi sentas kamparajn simplajn manĝaĵojn aparte apetitaj. Kelkaj diris, ke edziniĝo kun kamparano estas senperspektiva, sed mi opinias, ke malnoblaj estas tiuj homoj, kiuj ĉasas personan ĝuadon kaj malestimas kampulojn...”

Ŝi skribis daŭre:

“Estas kritikendaj la putraj pensoj malestimi kamparanojn kaj agrikulturan laboron, postlasitajn de miloj da jaroj. Tio havas gravan signifon

por redukti la tri grandajn diferencojn (nome tiuj inter la laboristoj kaj kamparanoj, inter urboj kaj vilaĝoj kaj inter fizika kaj mensa laboroj — la Red.), konstrui novan socialisman kamparon, oponi kaj sin defendi kontraŭ reviziismo.”

Publikigante ŝian leteron la redakcio de Hebej-provinca ĵurnalo aldonis sian noton, kiu laŭdis ŝian faron kaj honoris ŝin per tio, ke ŝi estas junulino kuraĝa en rompo kun malnovaj tradiciaj ideoj.

### SINHARDO

Baj Kihian estis diplomita en la Normala Universitato de Hebej-provinco en 1968. Antaŭ sia enoficigo ŝi kune kun kelkaj kunlernantoj venis al Hianguoĝuang-brigado, tre izola vilaĝo en la orienta parto de Hebej, por akcepti reedukon de tieaj malriĉkmparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La komunumanoj varme bonvenigis la studentojn venintajn el urbo.

En vintro de tiu jaro la komunumanoj de la brigado estis en transformado de salalkalaj kampoj. Baj Kihian sin ĵetis en tian intensan laboron. Por ŝi, la studentino veninta de urbo, la laboro estis rigora ekzameno. Ŝiaj manplatoj estis frot-



*Baj Kihian kaj ŝia edzo Bi Ĝen-juan*

vunditaj kaj la ŝultroj ŝveliĝis pro longtempa vektoportado. Ĉiutage post laboro, ŝi sentis laciĝon kaj doloron tra la tuta korpo.

La partia filio de la brigado tre zorgis pri la kresko de tiuj studentoj kaj ĝustatempe donadis al ili edukon. Maljunaj malriĉkamparanoj rakontis al ili pri tragika historio de sia familio en la malnova socio kaj pri la hodiaŭa feliĉa vivo.

Iliaj klaraj sentoj de amo al la nova socio kaj malamo al la malnova, kaj forta klasa kor-inklino al la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ donis al Baj Kihian profundan edukon. Ŝi komprenis, ke la hodiaŭa laciga laboro estas tute malsama al la subpremo kaj ekspluato suferitaj de la laboranta popolo en la malnova socio. La venko de la revolucio estas gajnita de la maljuna generacio per sinofero,

*Baj Kihian (la dua de dekstre), reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, instruistoj kaj lernantoj kune interkonsiliĝas, kiel pluapafaŝe plibonigi la edukan revolucion.*







*Baj Kihian vizitas gepatrojn de lernanto.*

revoluciaj gejunuloj devas daŭrigi ilian revolucionan aferon, kaj la laciĝo kaj ŝvito estas pagitaj por konstrui socialismon.

Eklumis ŝia menso, pli altiĝis ŝia memkonscio pri spertado de provo de malfacila medio kaj pri akcepto de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En kamplaboro ŝi honeste konsultis komunumanojn, ĉiam prenis konkure sur sin pezan kaj malpuran laboron. En laborpaŭzo ŝi instruis komunumanojn kanti, legis por ili ĵurnalojn kaj eksplikis kurantajn aferojn. Post laboro komunumanoj edukis ŝin kiel fariĝi vera filino de la laboranta popolo, kaj ŝi helpis kontiston en poentonotado, kalkulado kaj resumado. Iom post iom en kuna laboro Baj Kihian kaj tieaj komunumanoj starigis inter si profundan amon. Foje ŝi iris en la urbon por viziti sian familion kaj antaŭ la difinita dato revenis al la vilaĝo. Vidinte ŝin revenanta en neĝo, la vilaĝanoj venis por babili kun ŝi kiel parenco longe ne vidita.

## EDZINIĜO

Unu jaro pasis post la veno al la kamparo kaj por Baj Kihian aperis la problemo de edziniĝo. Ŝiaj patro kaj fratino esperis, ke ŝi revenu en la urbon kaj edziniĝu kun urbano, por ke ŝi estu

ĉiam kune kun siaj familianoj. Sed ŝi amas la kamparon, la komunumanojn kaj ĉion tiean. Iuj komunumanoj diris al ŝi: “Knabino mia, havu vian propran familion en nia vilaĝo!” Iun tagon, la mastrino de ŝia loĝejo demandis al ŝi: “Kiel vi opinias pri la knabo Ĝen-juan?” La demando tuj ruĝigis ŝiajn vangojn. Retrorigardante la pasigitan jaron, Baj Kihian ekmemoris Bi Ĝen-juan. En kuna laboro ŝi kaj li komprenis unu la alian kaj starigis inter si amon. En la malnova socio, la familio de Bi Ĝen-juan estis tre mizera kaj li perdis sian patron en la infanaĝo, tial li devis vivteni la familion. Post la Liberiĝo, li ŝatas laboron, zorgas pri la kolektivo kaj faras ĉion kun seriozeco. Kaj Baj Kihian devenis de laborista familio. En la malnova socio ŝiaj gepatroj multe suferis, kaj ŝi almozpmetis en sia infaneco. La Kompartio kaj Prezidanto Maŭ elsavis la mizerajn laborulojn kaj Baj Kihian fariĝis la unua studentino en sia familio... Ju pli ŝi pensis, des pli klariĝis al ŝi la menso. Ŝi pensis: “Mi estas filino de laboristo kaj li devenis de malriĉkamparana familio. Laboristoj kaj malriĉkamparanoj estas samfamilianoj. Estas la Kompartio kaj la laboranta popolo, kiuj kulturas kaj vivtenas nin. Ĉu ne estos signifoplena, se ni geedziĝos, kune laboros, lernos, helpos unu la alian kaj kontribuos nian forton al la konstruo de la nova socialisma kamparo?”


Baj Kihian montris siajn korajn vortojn al Bi Ĝen-juan. Post kelkaj tagoj, li diris al ŝi, ke ankaŭ li tion pripensis. Post nelonge ili geedziĝis. La sekretario de la partia filio de la brigado prezidis la ceremonion kaj preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj venis gratuli ilin.

## PROGRESO

Nelonge post la geedziĝo Baj Kihian aŭdis iajn ironiajn dirojn, kiujn ŝi prezentis en sia letero al la provinca ĵurnalo: "Antaŭe mi estis 'inda' studentino en la okuloj de iuj homoj, sed post kiam mi edziniĝis kun la kamparano, mi fariĝis malestimata de ili." Sub la kuraĝigo kaj subteno de la partia filio kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Baj Kihian decidis batali kontraŭ tiuj malnovaj ideoj. Post sia

geedziĝo la novaj geedzoj helpas unu la alian, progresas kune kaj sentas sin feliĉaj. En 1971, laŭ decido de la komunumo Baj Kihian fariĝis mezlerneja instruistino en la loko, tial Bi Ĝen-juan iniciate prenis sur sin plejpartan mastrumadon, por ke la edzino povu disponi pli da tempo al instruado.

En instruado Baj Kihian kaj ŝiaj gelernantoj ofte kune studis Marksismen-Leninismen kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, kritikis la absurdajn tezojn "lerni por fariĝi burokrato", "fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo" k.s, kaj partoprenis en agrikultura produktado. Multaj el la diplomitoj de la lernejo, revenintaj en la kamparon, amas agrikulturan produkton kaj la kamparon. Same kiel Baj Kihian, ili decidis kontribui sian tutan vivon al la glora afero konstrui novan socialisman kamparon.



### ĈINIO KONSTRUIS ALTEFIKAN ELEKTRONIKAN KOMPUTILON

Sub direktado de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, laboristoj, teknikistoj kaj kadroj de la dependa fabriko sub la Matematika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcesis konstrui altefikan tablan elektronikan komputilon de tipo "Ĉangĉeng 203". Tiu tipo havas la pliajn avantaĝojn de funkcia operacio, de pli granda entena kapacito kaj de pli alta rapideco, kompare kun ordinara tabla kalkulmaŝino, estas oportuna por komponado, reguligo kaj reviziado de programoj kaj povas aŭtomate operacii sub programa regado. Cetere ĝi estas ekipita per malgrandaj presilo kaj magnetrubanda registrilo, formante sendependan kaj kompletan komputan sistemon. La nova maŝino ne nur povas esti manipulata mane por solvi simplajn problemojn same kiel ordinara komputiloj, sed ankaŭ povas solvi komplikajn problemojn sub programa regado kaj parte fari la laborojn de ĝenerala elektronika komputilo.

### KONKURSOJ POR ELEKTI ĈINAJN PARTOPRENONTOJN AL LA SEPA AZIA SPORTKUNVENO

Post kiam nia lando decidis partopreni en la Sepa Azia Sportkunveno, la vastaj amasoj de sportistoj en diversaj lokoj ankoraŭ pli intense trejnas sin por levi la teknikan nivelon de sportoj. De aprilo ĝis junio, ĉijare, jam okazis elektaj konkursoj por 14 sportspecoj, inter kiuj estis kampaj kaj vojaj konkursoj, naĝo (inkluzive de plonĝo kaj akvopilko), gimnastiko, pezlevo, korbopilko, volebalo, piedpilko, tabloteniso, volano, teniso, biciklado, pafado, skermo kaj lukto.

Iuj el tiuj okazis lige kun ordinara tutlandaj konkursoj. En ili partoprenis ĉirkaŭ 2,000 sportistoj el diversaj lokoj de la lando, inkluzive tiujn el Tajvan-provinco loĝantajn en Japanio kaj Usono, kiuj estis aparte bonvenaj por diverslokaj sportistoj kaj vasta spektantaro. La konkursoj okazis en Pekino kaj aliaj pluraj urboj.

Tiuj konkursoj manifestis plian disvolviĝon de la amasaj sportaj aktivadoj de nia lando, kreskon de novaj fortoj kaj leviĝon de nia sporta nivelo.

# Tertremo ne povas skui firman volon de la homoj

—Vizito al plagitaj regionoj de la tertremo en Junnan kaj Siĉuan

**F**FRUMATENE de la 11-a de majo ĉijare, okazis forta tertremo de 7.1 gradoj en Jongŝan, Dagan, Jangin kaj Sujgiang de Junnan-provinco kaj Lejbo-gubernio de Siĉuan-provinco. Post la katastrofo ni venis al la plagitaj regionoj kaj vidis, ke tieaj popolanoj riparas domojn difektitajn de la tertremo kaj konstruas novajn, kune kun laboristoj kaj soldatoj de ĈPLA venintaj por helpi. Sub montoj kaj sur kampoj oni riparas detruitajn kanalojn, rikoltas maturajn tritikon kaj kolzon kaj ĝustatempe plantas rizon kaj semas maizon. Ĉie prezentiĝas vigla sceno de diligenta batalo kontraŭ la katastrofo.

## PREZIDANTO MAŬ INTERLIGIĜAS KUN POPOLANOJ DE LA PLAGITAJ REGIONOJ KORON ĈE KORO

Post la tertremo Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Partio kaj la Ŝtata Konsilantaro tre zorgis pri la plagitaj popolanoj kaj tuj sendis al ili konsolan telegramon, rapide komisiis al koncernaj unuoj savajn laborojn kaj sendis centran konsolan delegitaron al la plagitaj regionoj.

Ni vidis, ĉu en vilaĝoj aŭ sur kampoj, diversnaciaj popolanoj de la plagitaj regionoj varme studas la konsolan telegramon de la Centra Komitato de la Partio. Ili diris: “Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio montris al ni tiel grandan zorgon kaj ni nepre devas pli bone konstrui nian hejmlokon kun granda kuraĝo turnante la

malbonan aferon en bonan!” Ricevinte helpajn vestaĵojn, iuj maljunuloj kortuŝiĝis ĝis larmoj. Ili diris: “Altas la montaro Vumeng, tamen ĝi estas malpli alta ol la bonfaro de Prezidanto Maŭ; longas la rivero Ginŝa, tamen ĝi estas malpli longa ol la bonfaro de la Kompartio!” Iuj komunumanoj decidis konservi parton de la helpaj vestaĵoj kiel memorigaĵojn por eduki siajn posteulojn. Dum studo de la konsola telegramo de la Centra Komitato de la Partio komunumanoj de Ŝanjang-brigado de Ajtian-komunumo de Jangin-gubernio rememoris la tragedian scenon kaŭzitan de tertremo antaŭ 57 jaroj. Tiam neniu zorgis pri la plagitaj malriĉaj kamparanoj, multaj mortintoj ne estis enterigitaj eĉ post kelkdek tagoj kaj vunditoj ne povis ricevi kuracon. Damnindaj bienuloj plimultigis terrenton kaj devigis pagi ŝuldojn. Sub tiu preteksto ili perforte forprenis grenon kaj plugbovojn elsavitajn de la malriĉuloj el la katastrofo kaj enkarcerigis iujn malriĉajn kamparanojn, kiuj ne povis pagi terrenton, kaj pro tio multaj malriĉuloj formigris aliloken. La komunumanoj diris, ke komparante la pasintecon kun la nuntempo ili nepre lernos de Daĝaj-anoj la revolucionan spiriton de malcedema batalo kontraŭ naturaj katastrofoj, klopodos por gajni novan riĉan rikolton de agrikulturo kaj dankos la Partion kaj Prezidanton Maŭ per praktikaj faroj.

La centra konsola delegitaro, transpasante montojn malgraŭ laciĝo, profundigis en vilaĝojn por konsoli la plagitajn popolanojn kaj vunditojn, kio fortege kuraĝigis la tieajn popolanojn en



*Kadro de plagita regiono de Junnan-provinco legas la konsolan telegramon de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.*

ilia batalo kontraŭ la katastrofo kaj konstruo de ilia hejmloko. En Dukoŭ-komunumo de Lejbo-gubernio kamaradoj de la konsola delegitaro venis al la hejmo de pli-ol-70-jara komunumano Vu Hiutian, pridemandis lian vivon kaj pririgardis lian domon nove konstruitan helpe de laboristoj kaj ĈPLA-anoj. Tenante manon de kamarado de la konsola delegitaro la maljunulo diris: “Antaŭe mi estis sklavo. Estas Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio kiuj liberigis nin de subpremado de sklavposedantoj. Nun ankoraŭ estas Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio kiuj savis nin el la katastrofo. Ni neniam forgesos iliajn bonfarojn.”

### **UNUIĜA BATALO POR REKONSTRUI HEJMLOKON**

Hardite de la Granda Proleta Kultura Revolucio la amasoj kaj kadroj de la plagitaj regionoj montris sentiman heroecon kaj kolektivismon

antaŭ la serioza tertrema katastrofo. En la batalo kontraŭ la katastrofo la partiaj organizoj de diversaj niveloj ludis la rolon de fortika citadelo. Post la tertremo partia komitato de Mugan-komunumo de Dagan-gubernio, unu el grave plagitaj lokoj, montris nenan konsterniĝon kaj tuj starigis komandojn por organizi amasojn al batalo kontraŭ la tertremo. Samtempe ĝi sendis tri grupojn da homoj al la supera instanco por informi staton post la katastrofo. Ankaŭ komunumaj kadroj laborantaj en produktaj brigadoj rapidis al la komunumo malgraŭ vivdanĝero. Survoje ili organizis amasojn por savi vunditojn kaj interkonsiliĝis pri savmetodoj. Post finiĝo de la kunveno en la komunumo ili denove iris al brigadoj por tie mobilizi amasojn kaj direkti la savlaboron.

La komunistoj ĉiam staris en la fronto de la batalo kontraŭ la katastrofo. Liberigite de premo pro domfalo sekretario de la partia filio de Mugan-brigado Deng Fuhoŭ unue pensis pri la sekureco de la brigadanoj. Li kune kun aliaj brigadaj

kadroj rapidis al hejmo de iu komunumano kaj savis du homojn el la falinta domo. Tuj poste ili transvadis la abrupte ŝveligantan riveron por veni al la hejmo de komunumano Hiang Ŝuhan, kiu krias helpon, kaj savis ĉiujn kvar membrojn de la familio. Dum la savado oni informis lin, ke la domo de lia hejmo falis kaj premmortigis lian infanon kaj petis lin hejmenreveni. Sed Deng Fuhoŭ diris: “En la kriza momento mi kompartiano neniel devas forlasi mian batalpostenon!” En tiu antaŭtagmezo li iris al 6 produktaj grupoj por ekzameni la katastrofon kaj organizi amasojn al savlaboro.

21-jara kompartiano Luo Kjuanhiu kune kun milicanoj de la brigado savis pli ol dek komunumanojn. Krome ili funkciigis provizoran manĝejon, faris ĉiun klopodon por bone aranĝi vivon de la komunumanoj kaj gvidis ilin por rikolti kaj semi. Li diris al la komunumanoj: “La tertremo detruis niajn kampojn, tamen ĝi ne povas skui nian batalvolon de lerno de Daĝaj. Ni devas pli diligente produkti. Ni certe povos venki la katastrofon kaj rekonstrui nian hejmlokon.” Sub lia gvido la

komunumanoj rapide plenumis la taskon de rikolto de kolzo kaj tritiko kaj semado de maizo.

Sub la firma gvido de la partiaj organizoj kaj dank’ al edifo de kompartianoj la amasoj de la plagitaj regionoj faris obstinan batalon kontraŭ la katastrofo kaj aperis multaj avangardaj personoj malegoismaj. 17-jara junulo Miaŭ Ŝilun, malgraŭ sia doloriga vundo, kuris en la falontan ŝafostalon kaj elsavis pli ol 30 ŝafojn de la kolektivo. Kontisto de la brigado Lin Ĵukjuan elprenis ĉiujn kontlibrojn de la brigado malgraŭ vivdangero. Kamparana kuracisto Vu Dinghiang senhezite iris al najbaraj brigadoj kun medikamenta kesto sur dorso por tie kuraci vunditojn, kvankam lia domo estis faligita kaj lia infano vundita. Al Ŝujtian-brigado de Fejtan-komunumo mankis semoj por refoje semi sur kampoj detruitaj de la tertremo, komunumanoj do meminciante donis sian propran grenon al la brigado. Dank’ al kuna klopodo la aldona semado estis rapide plenumita. Nun la diversnaciaj komunumanoj de la plagitaj regionoj levis ardan tajdon de memsavo per produkto. Ili decidis per kolektivaj fortoj diligente konstrui sian hejmlokon pli bela.

*Kuraca taĉmento venis al plagita loko por fari ekzamenon al popolanoj kaj kuraci vunditojn.*





*Komunumanoj semas maizon tuj post la tertremo*

## FORTA HELPO

En la plagitaj regionoj ni vidis aviadilojn senditajn de la Centra Komitato de la Partio por paraŝutigi manĝaĵojn, medikamentojn, legomojn kaj aliajn materialojn. Sur Ginŝa-rivero kun multaj malprofundaĵoj kaj torenta fluo ŝipoj unu post alia transportas diversajn materialojn al la plagitaj regionoj. Centoj da kamionoj plensarĝitaj de materialoj el diversaj lokoj de la lando tagnokte galopis sur ŝoseoj al la plagitaj regionoj. Transpasantaj altajn montojn kaj profundajn ravinojn, multnombraj popolanoj transportas helpmaterialojn al komunumanoj kaj brigadoj, kiujn kamionoj ne povas atingi.

Tie ni renkontis medicinajn laborantojn, ĈPLA-anojn, laboristojn, milicianojn kaj sismologiajn laborantojn senprokraste venintajn de Junnan, Siĉuan, Pekino, Ŝanhajo, Tibeto, Gujĝoŭ k.a. lokoj. Ilia

spirito de tutkora servado al la popolo donis grandan forton al la plagitaj popolanoj por venki la katastrofon.

Ricevinte ordonon tuj ripari ŝoseon kondukantan al grave plagita regiono en la sekvanta tago post tertremo, la komandantoj kaj soldatoj de iu trupo de ĈPLA tuj rapidis al la loko en pluvo. Tiam la tertremo ankoraŭ ne tute finiĝis, tamen la batalantoj tagnokte persistis en riparado, starante en pluvo kaj koto spite al danĝero. En du tagoj ili jam finis la taskon, kiu bezonas dek tagojn en ordinara tempo. Mjaŭ-nacia soldato Vej Zuofang vundiĝis de ŝtono. Kiam gvidanto konsilis lin al ripozo, li diris: "Ni venas el la popolo kaj devas ĉiam konsideri ĝian intereson. Nun pli da homo signifas pli da forto, kaj mi ne devas forlasi la konstruejon!" Post bandaĝo al vundo li denove sin ĵetis en la laboron.

Por precize paraŝutigi helpmaterialojn, la aviadila grupo de Ĝang Guangcaj de iu truo de la Aera Armeo per mirinda kuraĝo kaj persistemo foje kaj refoje malaltigis aviadilojn kaj fine precize ĵetis materialojn al destinita loko en mallarĝa valo, en la alteco je ĉirkaŭ 200 metroj super la tersurfaco.

Kiam la kuraca grupo de Gaŭtong de Junnan-provinco rapidis al la plagita regiono, subite paneis la aŭto sur la vojo. Tiam torentis pluvo kaj glitigis la vojo. Sub tia kondiĉo estis malfacile por ili piediri kun pezaj medicinaj ekipaĵoj. Tamen ĉiuj diris: "Ju pli mallonge ni restos ĉi tie, des pli multe ni povos helpi klasajn fratojn." Malgraŭ la pezo de kuraciloj kaj glitiga vojo ili piediris antaŭen kaj fine atingis la lokon en la frumateno de la sekvanta tago.

Kvankam iuj lokoj en Liangŝan-a Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Siĉuan ankaŭ estis trafitaj de tertremo, tamen disvolvante spiriton de klasa amo la subprovinco sendis medicinan grupon al la grave plagita Jongŝan-gubernio de Junnan-provinco. Post atingo al la loko la medicinaj laborantoj tuj starigis simplajn malsanulajn domojn por akcepti vunditojn. Dum operacio al komunumano Vej Deming estis necese transfuzi sangon al li, kaj kuracistoj de la grupo senhezite dediĉis sian sangon al li. Por savi iun grave malsanan infanon ankaŭ alia kuracisto oferis sian sangon. Dank' al ilia zorgema kuracado multaj vunditoj resaniĝis kaj sin ĵetis en la batalon por rekonstrui sian hejmlokon.

# Sekretario de la partia komitato Vang Hjuegian



*Kamarado Vang Hjuegian*

**K**AMARADO Vang Hjuegian laboras 14 jarojn kiel sekretario de la partia komitato de Ŝuanggoŭ-komunumo de Sujning-gubernio, Giang-su-provinco. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ li modeste kaj tutkore servas al la popolo, tial li ricevis subtenon de vastaj amasoj de komunumanoj.

## RAKONTI DE LA KOMENCO

Ŝuanggoŭ-komunumo situas ĉe ambaŭ bordoj de la malnova fluejo de la Flava Rivero. Antaŭ la Liberiĝo, ĝi estis malriĉa loko. Kiam okazis inundo, la tero estis surkovrita de salalkalo; kiam ventegis, sablovento nebuligis la vidadon. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio tieaj amasoj unuapaŝe ŝanĝis malriĉan fizionomion de la loko. Sed, subfosado de fiulo, kiu ŝtele sin kaŝis en

la gvidantaro de la komunumo, kaŭzis al la loko multajn malfacilojn: la produkto kaj la vivnivelo de komunumanoj malaltiĝis, kaj iuj el la komunumanoj deprimiĝis. Sub tiu stato, la partia organizo de la gubernio sendis Vang Hjuegian, kiu iam funkciis kiel vicestro de la gubernio, al Ŝuanggoŭ por labori.

En aŭgusto de 1959, Vang Hjuegian venis al Ŝuanggoŭ. Demetinte sian tornistran, li tuj iris inter amasojn. En kvin tagoj, li vizitis ĉiujn vilaĝojn kaj brigadojn de la tuta komunumo kaj okazigis pli ol tridek kunsidojn kun tieaj kadroj kaj komunumanoj. Malriĉkampanoj kaj mal-superaĵ mezkomparanoj kun malpacienca diris al li: “Kamarado Vang, Ŝuanggoŭ estas malriĉa loko kun multaj salalkalozaj kampoj. Se tiuj kampoj estos reformitaj, do nia vivo multe pliboniĝos. Tuj gvidu nin por ŝanĝi la postiĝintan fizionomion!” Sed, iuj kadroj kapneis dirante: “Se ili povus esti reformitaj, do oni jam frue tion farus.” La diro vekis la pensindan demandon

en la kapo de Vang Hjuagian: “Kial la amasoj tiel malpacience deziras ŝanĝi la postĝintan fizionomion, sed iuj kadroj ne?”

Li prezentis tiun demandon al la komunumaj kadroj kaj decidis per ĝi unuigi la pensojn de la kadroj kaj fari al ili edukon pri revolucia tradicio konsiderante, ke por ŝanĝi la postĝintan produktan fizionomion de Ŝuanggoŭ oni devas unue ŝanĝi spiritan fizionomion de la lokaj kadroj.

Iun tagon de la komenco de nova jaro, Vang Hjuagian kondukis la komunumajn kadrojn kaj ĉiujn partiliajn sekretariojn de la brigadoj al la tombejo de martiroj de Givan-brigado kaj tie okazigis la plivastigitan kunvenon de la partia komitato. Farinte funebran saluton al martiroj, Vang Hjuagian forgratis neĝon sur la tero per mano, prenis plenanon da teraĵo kaj demandis al ĉiuj: “Kia estas la grundo?”

“Salalkala grundo, sur kiu neniu plantaĵo kreskas.”

“Kiom da tia tero havis ni malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj antaŭ la Liberiĝo?”

Aŭdinte tion, ĉiuj ĉeestantoj eksilentis. Plejparto el ili havis nek dometon nek colon da tero, kaj laboris kiel brutoj por bienuloj de generacio al generacio antaŭ la Liberiĝo.

“Ĉu vi pensis, kiel la tero revenis en la manojn de ni laboranta popolo?” Vang Hjuagian demandis denove.

Plejparto de la ĉeestantoj estas Ŝuanggoŭ-anoj, kaj multaj el ili partoprenis aŭ persone vidis la batalon por liberigi Ŝuanggoŭ. Rememorante la martirojn, la kadroj sentis doloron kaj honton en la koro pro tio, ke la postĝinta fizionomio de la loko, sur kiun la martiroj verŝis sian sangon, ankoraŭ ne tute ŝanĝiĝis, kvankam jam forpasis multaj jaroj.


Vang Hjuagian ekscitite diris: “Iuj diris, ke la tero en Ŝuanggoŭ estas sterila. Sed, niaj antaŭuloj ne pro tio cedis ĝin al la malamikoj. Por

*Vang Hjuagian ofte partoprenas en la kolektiva produktlaboro.*





*Vang Hjuégian edukas gejunulojn per la revolucia tradicio.*



la interesoj de la popolo ili heroe oferis sian vivon. Ĉu ni ne devas penege lukti por reformi la sterilan grundon?... La amasoj malpacience deziras reformon de la postiginta fizionomio, sed iuj el ni kadroj estas indiferentaj pri tio. Ĉu tiaj homoj meritas la nomon de kadroj de la Kompartio?"

Liaj vortoj forte ekscitis la kadrojn kaj ili neniel povis sin kvietigi.

En la jaro 1964, Prezidanto Maŭ faris la alvokon "lerni de Daĝaj en agrikulturo". Tio montris la direkton por nia Ŝuanggoŭ-komunumo. Vang Hjuégian foje-refoje propagandis al kadroj kaj amasoj la spiriton de Daĝaj-anoj, gvidis ilin por fosi riverojn kaj putojn, planti arbojn, grandaree turni sekajn kampojn en irigaciajn, plene reformi kampojn salalkalajn kaj venki sabloventon kaj akvostagnon sinapogante sur propraj fortoj kaj luktante kontraŭ malfaciloj. Dank' al tio pomua produktokvanto de sensemigita kotono superis 50 kg. en sinsekvaj ses jaroj kaj tiu de greno jaron post jaro altiĝis. En 1973, ili venkis naturajn katastrofojn de troa pluvo kaj sekegeco kaj akiris

riĉajn rikoltojn de greno kaj kotono. Ilia kontribuo al ŝtato pli kaj pli grandiĝas.

### ĈION POR LA PARTIO KAJ POPOLO

En 1963, Ŝuanggoŭ suferis de inunda katastrofo, kaj Vang Hjuégian tagnokte sin okupis pri savlaboro. Antaŭ la Printempa Festo, densa neĝo senĉese falis kelkajn tagojn. Zorgante pri la vivo de komunumanoj de kelkaj brigadoj kiuj trafis seriozan katastrofon, Vang Hjuégian tuj sendis al ili helpajn materialojn de la Partio kaj ŝtato. Frumatene de la tago de la Printempa Festo, li vekis ĉiujn komunumajn kadrojn kaj diris: "Ni estas kadroj de la Partio kaj devas profundiĝi inter la amasojn por helpi ilin venki malfacilojn!" Aŭdinte tiujn vortojn, ĉiuj estis kortuŝitaj.

Apenaŭ krepuskiĝis, Vang Hjuégian en pluvmantelo kaj kun apogbastono en la mano iris

al serioze plagita Daĝaŭ-brigado portante vatitajn litkovrilojn sur la ŝultro. Kiam li atingis la domon de 61-jara malriĉkamparano Ĝaŭ Jongpej, la lasta ankoraŭ ne ellitiĝis. Aŭdinte lian voĉon, la maljunulo rapide ellitiĝis. "Sekretario Vang, en tia granda neĝvento vi ankoraŭ venis vidi min!..." Antaŭ ol la maljunulo finis sian parolon, Vang Hjuegian jam metis vatitan litkovrilon en liajn manojn. Rigardante Vang Hjuegian plene kovratan de neĝoflokoj, Ĝaŭ Jongpej multe suferinta en la malnova socio ne povis paroli eĉ unu vorton pro ekscitiĝo.

En tiu tago, Vang Hjuegian vizitis multajn brigadojn, familianojn de martiroj kaj armeanoj kaj senhelpajn gemaljunulojn. En Gaŭgi-brigado, li rimarkis, ke malplena estas la akvovazo de la senhelpa maljunulo Gaŭ Giaĝen kun aĝo de pli ol 70 jaroj. Li tuj iris portante akvositelon al puto por ĉerpi akvon. Li levis la sitelon nur per la dekstra mano, ĉar lia maldekstra mano estis serioze vundita en la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj malbone funkciis. Li foriris nur post kiam li plenigis la akvovazon. Dum tagmanĝo komunumanoj invitis lin en sian domon por pasigi la festotagon, sed li kun danko rifuzis tion. Li iris de porkejo al bovstalo por rigardi dombestojn kaj konsiliĝis kun kadroj pri protektado de brutoj en vintro. Tio multe kortuŝis la aliajn.

## KURAĜA EN MEMKRITIKADO

Vang Hjuegian partoprenis en la Kontraŭjapana Rezistmilito, Liberiga Milito kaj Milito por Helpi Koreion kontraŭ Usona Agreso kaj faris multajn meritojn. Sed li neniam montris fierecon pro tio, ĉiam estas modesta kaj kuraĝa en kritiko de siaj eraro kaj manko. Tio donis bonan ekzemplon al aliaj kadroj kaj amasoj.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, ĉiam memorante la instrukcion de Prezidanto Maŭ "Vi devas teni politikon en komando, iri en la amasojn, kaj pli bone konduki la Grandan Proletan Kulturen Revolucion kune kun la amasoj", Vang Hjuegian profundigis en amasojn kaj iniciate petis iliajn kritikojn kaj helpon. Post serioza analizo de la kritikoj de amasoj, li trovis, ke kvankam antaŭe li diligente laboris, tamen li faris erarojn en iuj problemoj kaj tio portis pardonon al la Partio kaj amasoj, kaj la kaŭzo kuŝas en tio, ke li ne sufiĉe bone legis kaj studis Marksismen, Leninismen kaj Maŭzedongpenson kaj ne havis firman koncepton pri la linia batalo pro influo de la reviziisma

linio de Liu Ŝaŭki. Pensante tion, li plibone komprenis, ke la Granda Proleta Kultura Revolucio gvidata de Prezidanto Maŭ estas tute necesa kaj tre ĝustatempa ne nur por preventi restaŭron de kapitalismo en nia tuta lando, sed ankaŭ por koni kaj korekti liajn erarojn.

La amasa movado konigis lin, ke por plibone plenumi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kadroj devas ofte kaj konscie peti kritikojn kaj ekzamenon de amasoj. Tial li foje-foje petis de amasoj opiniojn ĉu en kunvenoj aŭ sur kampoj, aŭ en hejmoj de aliaj kadroj kaj amasoj. Li diris: "Se mi faras erarojn, do vi helpu min korekti ilin kaj nepre ne pardonu min ĉe tio, alie, malgranda eraro povas konduki min al la granda, kio kaŭzos grandan pardonon al la revolucia afero."

Iutage, du maljunaj malriĉkamparanoj de Ĉenvang-brigado alportis al li dazibaŭ-on kritikante lin, ke li ne serioze traktis iun kadron de ilia brigado, kiu faris gravan eraron.

En la sekvanta tago, Vang Hjuegian venis al Ĉenvang-brigado kaj okazigis kunvenon de komunumanoj. En la kunveno li unuflanke propagandis la politikon de la Partio pri kadroj, kaj aliflanke faris memkritikon. Li diris: "Mi havas respondecon pri la grava eraro de tiu klasa frato, ĉar antaŭe mi malmulte helpis kaj edukis lin. La traktado al la kadro konformas al la politiko de la Partio, sed ni ne bone klarigis tion al la komunumanoj, tio estas mia eraro. Mi akceptis vian kritikojn."

En 1971, Ŝuanggoŭ-komunumo unuafoje transformis sekajn kampojn kun granda areo en la porrizajn, tiel ke la totala produktokvanto de greno atingis novan nivelon. Aŭdinte laŭdojn de amasoj, Vang Hjuegian en iu kunveno faris memkritikon: Pro manko de sperto, la dispozicio de plantaĵoj en kelkaj brigadoj estis neracia, tial produktokvanto de rizo estis malalta, kaj ankaŭ tiu de aliaj plantaĵoj estis malbone influita. La memkritiko de Vang Hjuegian vekis fortan resonon. Iuj el kadroj kaj komunumanoj opiniis, ke la atingito estas ĉefa kaj la manko neevitebla, kaj oni ne bozonas ĝeni sin per tiu bagatelaĵo. Tamen Vang Hjuegian diris: "Ni devas sufiĉe taksi la atingojn, sed neniam devas kovri niajn okulojn per la sukcesoj por ne vidi mankon kaj eraron en laboro!" Poste, Vang Hjuegian vizitis kelkajn produktajn brigadojn, faris memkritikon kaj turnis sian lecionon en sperton de amasoj por antaŭenpuŝi la laboron.

# DANCOJ

## *Esprimi Amikecon per Argêntaj Kudriloj kaj Koloraj Fadenoj*



La koloraj fadenoj kunligas la tutan  
nondon kaj ni esprimas amikecon  
per arĝentaj kudriloj kaj koloraj fa-  
lenoj. La brodistinoj kun plena re-  
volucia patoso zorgeme brodas la  
leseĝnon pri amikeco de la unuiĝa  
natale de la azia, afrika kaj latin-  
amerika popolo, per kio ili esprimas  
profundan amon de la ĉina popolo al  
la azia, afrika kaj latinamerika po-  
popolo.







## *Argëntaj Sparkoj*

Argëntaj sparkoj brilas en la nokta firmamento super Huangpu-rivero. Direktate de la principo de Prezidanto Maŭ “penema luktado kontraŭ malfaciloj kaj sinapogo sur propraj fortoj”, la veldistoj de ŝipkonstruejo utiligas ĉiun sekundon kaj laboras eĉ sub ŝtormo, por konstrui dekmil-tonclan ŝipon.











## *Mi Bredas Militajn Ĉevalojn por la Revolucio*

**Krakas la vipoj kaj henas la ĉevaloj. La vicleplenaj intelektaj junulinoj radikiĝis sur la stepo. Ili bredas militajn ĉevalojn disvolvante la revolucionan optimismon de maltimo al malfaciloj kaj obstina laboro, por konstrui kaj defendi la landliman regionon.**

# *Sentineloj de Fervojo*



Gravurinte la fundamentan linion de la Partio en sian memoron, fervojistoj kun akra gardemo patrolas sur la vojlinio en neĝa nokto. Ili sagace kaj kuraĝe frakasis la intrigon de subfosado fare de malamiko, montrante nenian timon antaŭ danĝero, kaj garantiis la glatan trafikon de la fervojo.



de GJU HINHUA

**E**N la n-ro 6 de EPĈ ĉijare ni jam raportis, kiel la vasta amaso de konstruantaj armeanoj kaj popolanoj de nia lando venkis senombrajn malfacilojn kaj danĝerojn kaj konstruis la Ĉengdu-Kunming-an Fervojon sur Siĉuan-Junnan-altebenaĵo sub la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Lastatempe, ni faris refojan vizitadon al la nomita fervojo. Ni vidis, ke sur ĝi vagonaroj galopas portante diversnaciajn pasaĝerojn kaj lokajn produktaĵojn de la sudokcidentaj landlimaj regionoj al la koro de la patrolando Pekino, al la Nordokcidento kaj sudorientaj apudmaraj provincoj, kaj la pasaĝerojn kaj materialojn de aliaj lokoj de la patrolando al la sudokcidentaj landlimaj regionoj por ilia konstruado. La fervojo funkciis nur kvar jarojn, sed ĝi kaj ĝiaj kelkdek branĉoj jam ludis aktivan rolon por la disvolvado de industria kaj agrikultura produktado de la lokoj trairataj de la fervojo.

#### EKBRILAS LA TREZOROJ DE ALTEBENAĴO

Sub Siĉuan-Kunming-altebenaĵo kuŝas kelkdek specoj de metalaj kaj nemetalaj mineraloj en abunda

kvanto, kaj surtere kreskas densaj praarbaroj kaj fluas torentaj grandaj riveroj kun potenca fonto de akvoenergio. En la pasinteco, pro altaj montoj, danĝeraj riveroj kaj malfacila trafikado, plejparto de la mineraloj, krom malmultaj ekspluatataj malgrandkvante, dormis profunde sub la tero. Nun la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo jam pretigis favorajn kondiĉojn por ekspluati tiujn mineralojn.

Samtempe kun la konstruado de la nomita fervojo, komenciĝis unu post alia ankaŭ konstruadoj de entreprenoj ekspluatontaj kaj utiligontaj la lokajn riĉfontojn. En la Granda Proleta Kultura Revolucio multe ŝanĝiĝis la aspekto de tieaj montoj kaj riveroj. Ambaŭflanke de la mil-kilometra fervojo stariĝis feraj-ŝtalaj fabrikoj, karbominejoj, asbestominejoj, hidroelektraj fabrikoj, forstumejoj kaj lignoprilaborejoj, kaj ankaŭ malgrandaj fabrikoj fonditaj de la lokoj. La branĉoj de la fervojo kunligis tiujn fabrikojn kaj minejojn kun la aliaj lokoj de la tuta lando. En la jaro 1973, pli ol 70 procentoj el la varoj transportitaj

de la fervojo estis ŝtalajoj, gisfero, fer-ercoj, karbo, cemento, asbesto, ligno k.a. produktitaj de la lokoj trairataj de la fervojo.

La fervojo donis favorajn kondiĉojn al ekspluato de la praarbaroj sur Siĉuan-Junnan-alt-ebenaĵo. Antaŭ ekfunkcio de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo, la lignoj de okcidenta Junnan estis transportitaj al Kunming per aŭtoj, kaj la elspezo por transportado jam superis la koston de la lignoj. Pro tio la malfacila transportado fariĝis obstrukco por ekspluati la praarbarojn. Post ekfunkcio de la fervojo, la koncernaj fakoj de arbara industrio flosigas lignojn per la torento de Ginŝa-rivero kaj poste transportas ilin per trajnoj. Dank' al la fervojo la transportado de lignoj fariĝis tre facila. Nun la loko jam fariĝis unu el la gravaj fontoj de lignoj de nia lando. La fervojo alportas maŝinojn de forstumado kaj elportas lignojn senĉese. En la lastaj pli ol tri jaroj, la lignoj transportitaj de la fervojo al diversaj lokoj de la lando jam superis 2,000,000 kubmetrojn.


### PLI PROSPERAS LA URBOJ

La funkciado de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo pliproperigis la urbojn de la lokoj trairataj de la fervojo.

Ni veturis per vagonaro al la bordo de Niuĵi-rivero de Liangŝan-a Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco. Tuj ĵetiĝis al ni en la okulojn nova urbo Ganluo: La urbon trairas larĝa asfaltita strato, ambaŭflanke de kiu staras multaj novaj etaĝdomoj. Longdistancaj aŭtobusoj plenaj de pasaĝeroj kuras diversloken de la gubernia urbo.

Ganluo estis nomata antaŭ la Liberiĝo de ĵi-oj kiel "loĝejo de sovaĝaj anseroj kaj paseroj". Ĝi estas ĉirkaŭata de montoj kaj kunligiĝis kun la ekstera mondo nur per unu liana ponto trairebla per piedoj plus manoj kaj unu zigzaga vojeto. Post la demokratia reformo de Liangŝan en la jaro 1956, tie aperis domoj kaj malmultaj publik-utilaj servoj.


La funkciado de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo tute novigis la fizionomion de Ganluo. Por helpi la fervojan konstruadon oni konstruis tie ŝoseojn, pontojn, fabrikojn kaj establis butikojn. Dank' al la fervojo la antaŭa unika malgranda agrikulturila fabriko disvolviĝis en fabrikon de agrikulturaj maŝinoj, kiu pogrande produktas



*La fervojo strikte interligiĝas kun ŝoseoj kaj riveroj.*

pistmaŝinojn, furaĝodispecigilojn, akvoturbinojn kaj pecojn de diversaj agrikulturaj maŝinoj. Krom tio stariĝis ankaŭ lokaj industrioj de cemento, hidroelektro, manĝaĵo, presado, konstrua materialo k.a. En la pasinteco, troviĝis neniuj ŝoseoj en Ganluo, nun oni larĝigis la ordinaran aŭtovojon uzitan dum konstruado de la fervojo kaj turnis ĝin en norman ŝoseon. La liberigitaj sklavoĵoj diris: "En la malnova socio, ni povis vidi en nokto nur stelojn sur la ĉielo kaj lampirojn sur la tero, kaj neniam havis lampon. Nun ni fariĝis mastroj de la lando kaj havas fervojon, fabrikojn kaj elektrajn lampojn. La brilo de Maŭzedongpenso lumigis la novan socialisman Liangŝan!"

Kiam la vagonaro venis al la baraĵo de Anning-rivero transirinte Daliang-montaron, ni levis la rigardon kaj vidis, ke vicoj da fabrikdomoj kaj prosperaj kampoj formis belan bildon. Jen estas la nuna fizionomio de la antikva urbo Hiĉang.




*Nove konstruitaj domoj en Madaŭ de gubernio Hiĉang de Siĉuan-provinco*

Hiĉang deantikvece estas grava transsendejo de varoj sur Siĉuan-Junnan-altebenaĵo. Antaŭ ekfunkcio de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo transportado de varoj dependis de aŭtoj, kaj de Ĉengdu ĝis Hiĉang oni bezonis iri kvin tagojn, sed nun nur dekkelkajn horojn. La fervoja transportado ankaŭ akcelis la komercadon. La statistiko de la Hiĉang-a Branĉo de Fervoja Administrejo diras, ke en 1973, la komercaj fakoj de la loko aĉetis kaj elportis pli ol 40,000 tunojn da juglandoj, kaŝtanoj k.a. agrikulturaj flankokupaj kaj specialaj produktaĵoj escepte de diversaj drogoj de ĉina farmacio. Kaj la industria produktaĵoj alportitaj de diversaj lokoj de la lando plimultiĝis jaron post jaro, la venda sumo de ĉiutagaj bezonaĵoj, trikaĵoj, kulturaj instrumentoj, metalaĵoj k.a. duobliĝis kompare kun tiu antaŭ la funkciado de la fervojo.

## VILAĜOJ EN DISVOLVIĜO

Post malfermo al trafiko de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo, aliĝis la fizionomio de la vilaĝoj kaj ĵi-naciaj montvilaĝoj malfacile atingeblaj en la pasinteco. Ni veturis ekde Ĉengdu per vagonaro suden tra Ĉuanhi-ebenaĵo kaj Daliang-montaro, kaj atingis Juehi-gubernion, fame konatan grenejon en la nuna Liangŝan-regiono.

La popolo de tiu ĉi gubernio ricevis fortan helpon de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo en la reformado de sia montregiono. Dum la lastaj pli ol tri jaroj, vagonaroj portis al tiu ĉi gubernio pli ol 90 traktorojn kaj grandan kvanton da aliaj agrikulturaj maŝinoj, porakvaj ekipaĵoj kaj kemisterkoj, ĉ. milionon da arbidoj de pomo kaj piro de la provincoj Henan, Ŝandong kaj Junnan kaj aliaj lokoj de tiu provinco, kaj bonajn speciojn de terpomo kaj tritiko de Ĉuanhi-ebenaĵo kaj aliaj lokoj. Ĉio



*Ji-naciaj elektristoj instalas transformatoron en montregiono.*

ĉi tio akcelis la disvolviĝon de agrikulturo kaj forstumado.

La Cuhiong-a Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Junnan estas nomata kiel pordo de la okcidenta Junnan. Sed, en la pasinteco, tie troviĝis nur unu ĉefa ŝoseo, kiu sin kondukas al Kunming. Pro tio multaj materialoj stagniĝis tie kaj devis longtempe atendi transportadon. Nun, diversaj materialoj subtenantaj agrikulturon estas rapide disportitaj al la tuta subprovinco kaj pere de ĝi al sep subprovincoj en okcidenta Junnan.

Dank' al la fervojo, la nomita subprovinco povas plene utiligi la grandan kvanton da rimedoj de agrikultura produkto donitaj de la ŝtato kaj enkonduki progresintajn teknikojn, por disvolvi agrikulturon. En la jaro 1973, la tuta subprovinco akiris plenan riĉrikolton de agrikulturo.

## FORTIKE KRESKAS FERVOJISTOJ

Antaŭenmarŝas la socialisma vagonaro sur la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo kaj kreskas la junaj fervojistoj de nacimalplimultoj.

Sur la fervojo diligente laboras multaj junaj laboristoj kaj oficistoj de nacimalplimultoj. Ili estis sklavoj en la malnova socio aŭ gefloj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj paŝtistoj. Veninte de valoj de neĝmontoj kaj malproksimaj montvilaĝoj al fervojaj administrejoj, ili fariĝis la unuaj fervojistoj de nacimalplimultoj sur Siĉuan-Junnan-altebenajo.

Ji-nacia stiristo de dizela lokomotivo Ĝang Venguang partoprenis en konstruado de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo. Tiam li stiris vaporan lokomotivon por trakosternado kaj pontokonstruo. Li estis neesprimeble ĝoja kaj emocia, kiam li pensis ke la fervojo kunligos la vastan Sudokcidenton kaj lian hejmlokon kun la ĉefurbo Pekino kaj aliaj lokoj de la tuta lando. Dum la streĉa konstruado, li kaj aliaj konstruantoj entuziasme laboris tiel en tago kiel en nokto. Post ekfunkcio de la fervojo, li estis restigita de supera instanco por stiri dizelan lokomotivon. Li decidis neniam vanigi la esperon de la Partio kaj la popolo. Post 2-3-monata diligenta lernado helpate de han-aj laboristoj, li bone konis la cirkviton kaj stiran teknikon kaj komencis stiri dizelan lokomotivon. En la lastaj pli ol du jaroj, li stiris lokomotivon sur la fervojo kaj ĉiam tenis avangardecon en sekura veturado.

Aliuvugiaŭ, ji-nacia knabino de Liangŝan, kiu estis sklavino en sia infaneco, nun estas pakajistino de iu stacio sur la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo. Ŝi diligente studas politikon kaj fakan scion kun revolucia obstineco kaj tutkore kaj tutanime servas al diversnaciaj popolanoj. Dum la lastaj du jaroj, ŝi neniam eraris en sia laboro.

Nun ĉ. mil laboristoj kaj oficistoj de ji, lisu, naŝi, daj, baj, huj kaj aliaj nacioj servas sur la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo. Post la hardado de la Granda Proleta Kultura Revolucio, senĉese altiĝas iliaj konscioj pri batalo inter la du klasoj kaj du linioj kaj pri daŭra revolucio, kaj ili prenis sur sin oficojn de gvidanto de stacio, teknikisto, deĵoristo, transportisto, publiksekuristo, staciservisto kaj stiristo. Ili kaj han-aj fervojaj laboristoj kaj oficistoj kune batalas en unuiĝo kaj diligente laboras tagnokte por garantii glatan transportadon de granda kvanto da materialoj por industrio, agrikulturo kaj konstruado kaj pasaĝeroj al diversaj lokoj de la lando.

# Ĉu kritiko kontraŭ Konfucio estas “pereigi la ĉinan tradician kulturon”?

—Vizito al Ĝoŭ Jiliang, Profesoro de la Pekina Universitato

**A**NTAŬNELONGE, ni vizitis Profesoron Ĝoŭ Jiliang, estron de la fakultato pri historio de la Pekina Universitato. Li diris, ke la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio, persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto de nia popolo Prezidanto Maŭ, konsternis kaj kolerigis la reakciulojn en- kaj ekster-landajn. La kliko de Ĉiang Kajŝek raŭke kriaĉis, ke kritiko kontraŭ Konfucio pereigis la ĉinan tradician kulturon. La kaŭzo kuŝas ĝuste en tio, ke la movado deradike frakasis la spiritan apogilon de ilia reakcia regado.

Kio estas la ĉina antikva kulturo aŭ la ĉina tradicia kulturo? Prof. Ĝoŭ Jiliang diris: “Frue en la jaro 1940, Prezidanto Maŭ montris: **‘En la longdaŭra feŭda socio de Ĉinio estis kreita brila antikva kulturo. Studi la disvolviĝon de tiu antikva kulturo, forigi ĝian feŭdan rekrementon kaj asimili ĝian demokratian esencon estas necesa kondiĉo por disvolvi la novan nacian kulturon kaj levi la nacian memfidon, sed ni absolute ne devas engluti ĉion sen-elekte kaj senkritike. Estas necese apartigi ĉiujn dekadencajojn de la antikva feŭda reganta klaso disde la bona antikva kulturo de la popolo kun pli aŭ malpli demokratia kaj revolucia karaktero.’**” Prof. Ĝoŭ daŭrigis: “Ni ĉiam juĝas la antikvan kulturon dialektike, t.e. apartigi ĝian progresan parton disde ĝia postiginta kaj reakcia parto. Oni taksas ĝin per tio, ĉu ĝi servis al la nove aperintaj kaj leviĝantaj klasoj kaj protektis novajn aferojn, aŭ servis al la putraj kaj dekadencaj klasoj por plaĉi al la konservativaj fortoj farantaj restaŭron kaj regresigon de la historio. En la ĉina historio, ĉiuj putraj dekadencaj reakciuloj estis kultantaj Konfucion, ĉar lia doktrino konformis al ilia politika tezo konservativa kaj regresa. Kontraste kun tiuj, legalizistoj propagandis renovigon kaj akcelis progreson, kio estas progressa parto de la ĉina tradicia kulturo.”

Li daŭrigis: “Kompreneble, en la pli ol dumil jaroj konfucianismo okupis gravan lokon en la historio kaj socio de Ĉinio.” “Sed”, li diris emfaze, “tio ne signifas ke ĝi mem estas bonaĵo.”

Li diris ekzemple: “En la socioj de la Okcidento en la mezaj jarcentoj gravan pozicion iam okupis kristanisma teologio, ĉu ni hodiaŭ ankoraŭ devas opinii, ke ĝi estas kvintesenco de la okcidenta kulturo? Konfucianismo reprezentas interesojn de sklavposedanta klaso. Kiam la sklavosistemo frontis tujan disfalon, Konfucio elmetis restaŭran kaj regresan ideologion por savi malnovan reĝimon kaj malhelpi la viglan disvolviĝon de la nove leviĝinta feŭdbienula sistemo. Lia doktrino poste estis utiligata kaj perfektigita de la regantoj de la feŭda socio kaj servis por firmigi la feŭdan regadon. Tial Konfucio estis titolita de regpotenculoj kiel ‘la plej sankta majstro’, kaj konfucianismo fariĝis superrega spirito en la longdaŭra feŭda socio. Tiu ideologio regis kaj influis diversajn kampojn de la superstrukturo de feŭda socio, profunde penetris en politikon, juron, filozofion, kulturon, arton k.a. kaj per tio firme katenadis la popolon.”

Prof. Ĝoŭ daŭre rakontis al ni, ke ankaŭ reakciuloj en la lastaj jarcentoj uzis konfucianismon kiel ideologian armilon por trompi kaj subpremi la popolon. Li diris: “Frue en la 17-a jarcento, klerikoj de la Okcidento enkondukis la doktrinojn de Konfucio kaj Mencio, ideologion konservativan, paseisman kaj oponantan la popolan reziston, sed ne la ideologion de la legalizista skolo, kiu pledis por renovigo. En la mezo de la 19-a jarcento, imperiisma kulturo penetris en Ĉinion, post kiam la lasta falis en duonkolonian kaj duonfeŭdan socion. Tuj post sia eniro en Ĉinion, imperiistoj kolektis kaj subtenis ĉion putran, postigintan kaj reakcian, por bari la disvolviĝon de

nia lando kaj sklavigi la popolon. Kulto al Konfucio kaj legado de konfucianismaj klasikaĵoj, malnovaj etiketo kaj ideologio k.a. spegulis duonfeŭdajn ekonomion kaj politikon kaj apartenis al la kategorio de duonfeŭda kulturo. Ĝi formis reakcian aliancon kun imperiisma kulturo en kulturo kaj servis al imperiismo kaj feŭda klaso. En tia stato, konfucianismo estis pli alte kultita, kvazaŭ ĝi estus la tradicia kulturo de Ĉinio.”

Prof. Ĝoŭ klare montris: “Konfucianismo absolute ne povas reprezenti la tradician kulturon de Ĉinio!” Li diris: “Unue, la reakcieco de konfucianisma skolo kuŝas en tio, ke Konfucio kiel paseisto tutforte klopodis por restaŭri kaj regresigi la historion, agis kontraŭ la historia tajdo. Ke reakciuloj de ĉiuj dinastioj en la historio kultis al Konfucio kaj utiligis lian doktrinion por sia regado, tio ja signifas, ke konfucianismo servis al regresigo kaj restaŭro kaj konformis al ilia ideologia sistemo por restarigi malnovan reĝimon kaj retroirigi la historion. Due, Konfucio predikis, ke ĉio estas antaŭdestinita de la ĉielo. La ‘sinrego por restarigi etiketon’, ‘etiko’, ‘nomoj de hierarkio’ k.a. ĉiuj distrustemaj de li rilatis kun lia ‘antaŭdestinismo’. Ĉio ĉi tio estas ekstreme putra babilajo. Konfucio diris nenion signifan, eĉ se oni taksis lin laŭ la vidpunkto de ideisma filozofio. En sia verko *Parolado pri Filozofia Historio* Hegelo diris, ke Konfucio diris nur ordinaran moralon sen io ajn valora kaj kun neniom da spekulativa filozofio”.

Prof. Ĝoŭ diris: “La doktrinoj de Konfucio kaj Mencio estas reakcia kulturo kaj centpocenta feĉo.”

Do, kio estas la antikva kulturo de nia lando kun revolucieco kaj progreseco? Prof. Ĝoŭ diris: “En la tre longdaŭra feŭda socio de Ĉinio, troviĝis la ideologio de legalizista skolo, estiĝinta antaŭ Kin-dinastio, tute kontraŭa al konfucianismo. Kontraste kun konfucianismo, ĝi reprezentis interesojn de nove aperinta feŭda bienula klaso, protektis ĝian reĝimon, konforme al la tendenco kaj direkto de la socia disvolviĝo, ludis aktivan rolon por puŝi socion antaŭen. En tiu ĉi senco, la ideologio kaj kulturo de legalizistoj estis konformaj al deziroj kaj interesoj de la laboranta popolo en la historio.

“Imperiestro la Unua de Kin-dinastio en la tria jarcento a.K. estas la unua homo kiu unuigis Ĉinion kaj efektive renovigan ideon de legalizista skolo en Ĉinio. En la historio de Ĉinio, plejparto de la politikistoj en la komenca periodo de la feŭda socio, reprezentanta nove aperintajn feŭdajn fortojn, kultis al la legalizistoj kaj oponis kontraŭ konfucianismo; kaj pensuloj, kiuj aprobis renovigon

kaj progreson, subtenis novajn aferojn kaj postulis reformon al malnova reĝimo, karakteriziĝis pli malpli per la ecoj de legalizistoj.”

En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, Prof. Ĝoŭ Jiliang vigle partoprenis en kritikado kontraŭ la reakcia ideologio de Konfucio kaj Mencio. Surbaze de tio, li studis multe da historiaj dokumentoj kaj verkis lastatempe la artikolojn “Legu de la ‘Disertacio pri la sistemo de princlandoj’ de Liu Zong-juan” kaj “Kiel Vang Ĉuanŝan taksis Imperiestron la Unuan de Kin-dinastio?” kiuj speciale studis legalizistojn kaj iliajn penson kaj kulturon. Li diris: “Sen detruo ne estas konstruo. Ĉio nova kaj progresiva povos pli bone kreski, nur se oni detruos putraĵojn kaj postiĝintaĵojn. Post la studo, mi komprenis pli klare pri la ideologio de la legalizista skolo kun progresiva kaj revolucia rolo, kiu reprezentas la eminentan tradician kulturon de Ĉinio.”

Li parolis ankaŭ pri pinto-kontraŭ-pinta batalo farita de la du skoloj de konfucianismo kaj legalizismo en la problemo de “ĉielo” kaj “antaŭdestinismo” dum pli ol dumil jaroj de Ĉinio. Prof. Ĝoŭ diris: “Dank’ al tiu batalo kvintesenca kaj feĉo de la tradicia kulturo estis klare distingitaj. Konfucio predikis, ke troviĝis “Ĉielo”, kiu decidis ĉion de la homaro, kaj enkorpigis kaj sanktigis ĝin por propagandi ‘viva kaj morton destinas la sorto, kaj riĉecon kaj noblecon decidas la Ĉielo’. Tio estis manovro de sklavposedantoj por mistifi la popolon kaj firmigi ilian regadon. La eminenta reprezentanto de la legalizista skolo Hjunzi (lia aktivado estas inter ĉ. 298-238 a.K.) oponis kontraŭ tio, ke oni rigardas fenomenojn de la naturo kiel agadon de la volo de la Ĉielo, kontraŭ ‘antaŭdestinismo’, kaj elmetis la tezon ‘regi la ĉielon por utiligi’ opiniante, ke homo devas regi kaj utiligi ĉion de la naturo disvolvante sian aktivecon.” Li prenis la dinastiojn Han, Tang kaj Song kiel ekzemplojn por pluapase klarigi la staton de pinto-kontraŭ-pinta batalo inter la du skoloj.

Li diris: “En Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.), reprezentanto de konfucianoj Dong Ĝongŝu, disvolvinte la tezon pri ‘antaŭdestinismo’ de Konfucio, asertis, ke la alterno de printempo, somero, aŭtuno kaj vintro estas decidita de la ‘Ĉielo’ por esprimi ĝiajn ĝojon, indignon, malĝojon kaj ridon, kaj ke la regantoj regas la mondon laŭ la volo de la Ĉielo. Male, Vang Ĉong (ĉ. 27-79 p.K.), materiisma pensulo de Han-dinastio, kontraŭstaris al Dong Ĝongŝu opiniante, ke ĉio de la mondo naskiĝas kaj disvolviĝas nature, sed ne estas destinita de la



tiel nomata volohava Ĉielo. Li ankaŭ refutis la babilaĵon pri tio, ke 'la potenco de la regantoj estas donita de Dio'.

“En Tang-dinastio (618-907) troviĝis Han Ju kaj Liu Zong-juan, kiuj staris unu kontraŭ la alia en ideologio. Han Ju distrumpetis ‘antaŭdestinism’ dirante, ke ‘noblon kaj malnoblon, feliĉon kaj malfeliĉon decidas la Ĉielo’. Sed, Liu Zong-juan klare propagandis, ke la socion regas la homoj mem, sed ne la Ĉielo.

“En Song-dinastio (960-1279), reprezentanto de konfucianoj Ĝu Hi elmetis la tezon de ‘antaŭdestinita naturo’, kiu signifas, ke la feŭda etiko ekzistas kun la Ĉielo. Sed Vang Anŝi, fama politikisto de la legalizista skolo, elmetis la tezon, ke la ‘antaŭdestinismo estas netiminda’, kaj asertis, ke la fenomenoj de la naturo rezultis el ĝia evolua movado, sed ne el decido de la t.n. Ĉielo. Por fari renovigon, Vang Anŝi opiniis, ke oni ne nur ne devas timi antaŭdestinism, sed ankaŭ devas formeti la kodojn de praavo kaj opiniojn de kontraŭuloj.”

Prof. Ĝoŭ diris: “Nur kritikante la putrajn kaj postĝintajn doktrinojn de Konfucio kaj Mencio, ni povos vere heredi kaj disvolvi la antikvan eminentan kaj progresan tradician kulturon de nia lando.”

La profesoro daŭrigis: “La Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro ĉiam donas grandan atenton al disvolvado de tradicia progresita kulturc. Pri tio mi havas profundan komprenon rezultitan el la studado pri historio dum kelkdekaj jaroj.”

Post la Liberiĝo, sub la zorgo de la Partio kaj registaro, oni faris multajn laborojn por ordigi kaj studi klasikaĵojn. Ne nur estis instalitaj la specialaj

fakoj por klasikaĵoj en iuj universitatoj, kiuj ordigis nemalmultajn klasikaĵojn, kiel fari interpunkciadon al *La 24 Historiaj Libro*j kun kelkdekaj milionoj da ĉinaj ideografiaĵoj, sed ankaŭ fonditaj eldonejoj por klasikaĵoj en Pekino kaj Ŝanhajo. En 1971, oni eldonis libron verkitan de Sinjoro Ĝang Ŝiĝaŭ *Epitomo el Verkaro de Liu Zong-juan* kun pli ol miliono da ĉinaj ideografiaĵoj. La verko estas frukto de la speciala dumviva studado de Sinjoro Ĝang Ŝiĝaŭ pri la verkaro de Liu Zong-juan. Krome, ankaŭ estis multe eldonitaj klasikaj romanoj kiel *Sonĝo de Ruĝa Buduaro*. Post la Liberiĝo, nia lando aparte donis atenton al arkeologia laboro. Ĝi starigis ne nur specialajn esplorajn organojn, sed ankaŭ arkeologiajn taĉmentojn en diversaj lokoj. Prof. Ĝoŭ diris: “Ĉiang Kajŝek kaj lia bando superŝutis nin per malicaj atakoj, ke la kritiko kontraŭ Konfucio celas ‘pereigi la ĉinan tradician kulturon’. Tio ja atestas, ke ili estas apostoloj de Konfucio.”

Prof. Ĝoŭ finis sian paroladon per jenaj vortoj: “En nia lando, pensoj de ĉiuj ĉefoj de oportunismaj linioj en la historio rilatis al la doktrinoj de Konfucio kaj Mencio. Sencia Lin Biaŭ kriaĉis, ke la konfucianisma skolo estas ‘fonto de la ĉina kulturo’, kaj prenis konfucianism kiel reakcian batalilon ideologian por uzurpi regpotencon de la Partio kaj restaŭri kapitalism. Tial, kritiko kontraŭ Konfucio estas grava konsistiga parto de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ, kaj celas elfoson de ideologia radiko de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Lin Biaŭ kaj pli rigoran kritikon kontraŭ Lin Biaŭ. Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio estas nuntempa grava klasbatalo en nia lando kaj revolucio en politika kaj ideologia kampoj. Ni nepre devas konduki ĝis la fino la batalon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio.”

*Profesoro Ĝoŭ Jiliang (la dua de maldekstre) kaj studentoj kune studas pri la ĉina historio koncerne batalon de la laboranta popolo kontraŭ Konfucio.*



# Alflugis Montagloj

—Pri Vizitado de la Albana Ŝtata Ensembro de Popolaj Kantoj kaj Dancoj en Ĉinio

**E**N somermezo spektantoj de nia ĉefurbo kun granda ĝojo bonvenigis niajn batalamikojn de la Albana Ŝtata Ensembro de Popolaj Kantoj kaj Dancoj. La albanaj artistoj alportis al ni ne nur sian elstaran arton sed ankaŭ profundan revolucionan amikecon de la albana popolo al la ĉina.

## BELA PREZENTADO

La arto de popolaj kantoj kaj dancoj de Albanio havas longan historion kaj vastan amasan bazon. Post la liberiĝo, sub direktado de la literatura kaj arta principo de la Albana Labora Partio, la popola arto ricevis novan disvolviĝon. Ilia prezentado montris al ni, ke la nacia popola arto de la socialis-

ma Albanio pompe floras tra la heroa montara ero.

Pli ol 20 programeroj prezentitaj de la nomita ensembro en Pekino estis saturitaj de revoluciaj entuziasmo, optimismo kaj heroismo kun forta vivspiro. Ili vivece prezentis la proceson de batalado de la heroa albana popolo kontraŭ fremdlandaj agreso kaj interveno por nacia liberiĝo, varme prikantis brilajn venkojn sur diversaj frontoj de la socialisma Albanio kaj kun profunda sento esprimis varman amon kaj respekton de la albana popolo al la Albana Labora Partio kaj kamarado Enver Hoxha. Harmonia kunfandiĝo de la revolucia

*La ensembro de Albanio faras prezentadon en Pekino.*



enhavo kaj originala nacia formo estas okulfrapa karaktero de tiuj programeroj.

La ĥoraĵo *Vortoj de Enver, Vortoj de la Partio* prikantas la grandan gvidanton de la albana popolo kaj figure esprimas la heroan spiriton de la albana popolo brave marŝanta antaŭen sub la gvido de kamarado Enver Hoxha. En la solo *La Proletoj de la Tuta Mondo Unuiĝu!*, kantisto Ramiz Kovaĉi per siaj vasta diapazono de voĉo, profunda tembro kaj forta sentebleco de dinamiko sentigis grandiozecon kaj fortecon de lavango... En virina solo *Festo de Kooperativo* kantistino Brita Babajani per sia rafinita kaj lirikeca voĉo kondukis nin kvazaŭ en la varman gajan festatmosferon de gekooperativanoj pro riĉa rikolto.

La dancoj de la ensemblo disvolvis antaŭ niaj spektantoj bildojn de armita batalo de la albana popolo kaj ĝia konstruado de nova socialisma vivo. La danco *Liberaj Batalantoj* vivece montris bravan batalon de la albana popolo por sendependeco kaj libero, kun glavo en la mano, kaj ĝian heroan spiriton ĝisfine konduki la sangan batalon kontraŭ la malamikoj. La danco *Lumo* en danca lingvo ekstraktita kaj muldita el la reala vivo vivece prezentis sinforĝesan laboradon de la albana popolo por efektiviĝi elektriigon de la tuta lando kaj montris al ni grandajn ŝanĝiĝojn en malproksimaj kaj

izolitaj vilaĝoj de Albanio. La granda danco *Albanio en Festo*, en kiu partoprenis ĉiuj artistoj de la ensemblo, per kolorriĉaj kaj imponaj dancscenoj montris kortuŝajn spektaklojn, kiel la albana popolo varme jubilas al la nova socialisma vivo, strikte unuiĝante ĉirkaŭ la Labora Partio.


## PROFUNDA AMIKECO

La kamaradoj de la ensemblo havis la komunan senton: Surpaŝinte la teron de Ĉinio ili tuj sentis senkomparan intimecon, kvazaŭ ili venus al sia hejmo.

Informiĝinte pri la baldaŭa vizito de la ensemblo, la membroj de la Ĉina-Albana Amikeca Popolkomunumo tuj ekpreparis sin por bonvenigi la albanajn amikojn. Gejunuloj mem kreis dancojn *Bonvenigo kaj Alflugis Bravaj Montagloj!* prikantantajn batalan amikecon inter Ĉinio kaj Albanio. Sur kampoj de la komunumo la albanaj amikoj ĝojiĝis vidante, ke la poploj, propramane plantitaj de albanaj amikoj vizitintaj Ĉinion antaŭ kelkaj jaroj, nun prospere kreskas, kaj ke branĉoj de fruktoarboj de ili plantitaj estas peze klinitaj de fruktoj arome odorantaj. Tio simbolas eternan amikecon inter la ĉina kaj albana popoloj. Dancisto Laĉi ĝoje diris al la komunumanoj: "Mi estas malnova membro de la komunumo!" Aŭtune de 1967, kiam li kiel membro de la Amatora Ensemblo de



*Dueto Ankaŭ Knabinoj Ekprenas Pafilon*



*Danco Muĝas la Montaro*

Tiraneo “Pioĉo en Unu Mano kaj Pafilo en la Alia” vizitis la komunumon, li kaj aliaj kamaradoj estis honore nomitaj kiel membroj de la komunumo. Kantisto Ibrahim Dukiĉi diris: “La amikeco inter ni fariĝis ankoraŭ pli profunda kaj mi povas nur per mia kantado esprimi mian laŭdon pri amikeco inter niaj du landoj.”

Kamaradoj de la ensemblo kun granda intereso vizitis la dancan lernejon sub la Centra Arta Universitato “La Sepa de Majo” fondita en 1971 kaj rigardis la prezentadon de la lernantoj. La infana baledo *Abeloj kaj Urso* kreita de la lernantoj profunde impresis la albanajn batalamikojn. Post la prezentado, kiam malgrandaj aktoroj malsupreniris de sur la scenejo, la albanaj artistoj tuj tiris ilin al si por ke ili sidiĝu apud ili. Kiam albanaj aktoroj kantis sur la scenejo *Marŝo de Partizanoj* plenan de batalspirito, iu ĉina malgranda aktorino ludinta rolon de “abelo” mallaŭte akompanis ilin en albana lingvo, kio forte kortuŝis la albanan aktorinon apude sidantan. Tiu firme brakumis ŝin kaj kune ekkantis.

En la Centra Instituto por Nacimalplimulto, studentoj en diversaj helkoloraj naciaj kostumoj kantis kaj dancis por honori la ensemblon. Ili prezentis por la gastoj el malproksimo kantojn kaj

dancojn kun klara nacia karaktero. Ankaŭ kamaradoj de la ensemblo sursceniĝis por prezenti belajn popolajn kantojn kaj dancojn. Ĉe tio tuj ekbolis la tuta prezenta halo. La kanto *Pekino — Tiraneo* firme kunligis la koron de la albanaj kunbatalantoj kaj ĉinaj studentoj.

#### KANTADO POR AMIKECO

Kun pli kaj pli kreskanta amikeco inter Ĉinio kaj Albanio, pli kaj pli pompe floras ankaŭ la amikeco inter ĉinaj kaj albanaj artistoj. Nun ĝuste kiam nia lando pli profunde disvolvas la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la Albana Ŝtata Ensemblo de Popolaj Kantoj kaj Dancoj venis al nia lando, kio liveris al la ambaŭlandaj artistoj bonan ŝancon por lerni unu de alia kaj interŝanĝi spertojn.

*Jubilado de Montanoj al Kamarado Enver* estas elstara kanto kun gusto de popola kanto en nordo de Albanio kaj tre ŝatata de niaj popolo kaj artistoj. En amuzkunveno aranĝita de la ĉefurbaj kulturaj kaj artaj rondoj honore al la ensemblo, la fama pianisto kamarado Jin Ĉengĝong kun plena proleta pasio ludis tiun melodion. Iu kamarado de la ensemblo emocie diris: “Kamarado Jin Ĉengĝong tiel sukcese ludis la melodion, ĉar li pro-

funde komprenas la enhavon de la kanto kaj konas karakterojn de la nordalbanaj popolaj kantoj.”

Ankaŭ la albanaj artistoj amas ĉinan revolucionan arton. Post atingo al Pekino, antaŭ ol bone ripozi, ili tuj eklernis de la Ensemblo de la Ĝenerala Politika Departemento de ĈPLA la dancon *Vestolavado*. Dank’ al sia diligenteo nur en du tagoj, ili ellernis la tekston de la kanto kaj la dancmovojn en “vestolavado”. En la inaŭguro ili tre sukcese plenumis tiun dancon kaj ricevis tondran aplaudadon de la spektantoj. Krom tio, ili ankaŭ ellernis kaj sukcese prezentis en la ĉina lingvo kantojn *La Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino kaj la Ok Punktoj de Atentigo* kaj *Marŝo de Batalo*. La prezentado de la albanaj artistoj plena de revolucia pasio kaj batalaj esprimoj trovis varman laŭdon de la vasta spektantaro. La arta direktanto de la ensemblo Diŝ Daija, kiu, antaŭ ok jaroj, verkis muzikon

por la kanto *Veraj Amikoj* okaze de la gratula telegramo sendita de Prezidanto Maŭ al la Kvina Kongreso de la Albana Labora Partio, tre ŝatas ĉinajn revolucionajn kantojn. Kiam li ricevis tri volumojn de *Novaj Kantoj sur Batalkampoj* en Ĉinio, li firme premis la manon de ĉina kamarado dirante: “Antaŭ ok jaroj mi komponis okaze de la telegramo de Prezidanto Maŭ kaj pro tio mi sentis grandan honoron. Estontece mi daŭre kantos por la amikeco inter Albanio kaj Ĉinio kaj edukos nian junan generacion por ke ĝi por ĉiam kantu pri nia amikeco.”

La kantado de “intima amiko trans maro, proksimas ja kvazaŭ najbaro” sonas tra Ĉinio kaj Albanio. Tiu kanto plena de batalamikeco inter Ĉinio kaj Albanio por ĉiam resonas en la koro de niaj du popoloj kaj instigas nin antaŭenmarŝi ŝultro ĉe ŝultro.

### *Ekskurso sur la Granda Muro*





# Parencoj de Norman Bethune vizitis Ĉinion

**L**AŬ la invito de nia Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj, parencoj de la granda internaciisma batalanto Norman Bethune venis al Ĉinio. Ili estis liaj tri nevinoj sinjorinoj Janete Cornell, Ruth Neily kaj Joan Lindley kaj liaj bonevoj sinjoroj Ronald Cornell kaj Hugh Neily. En majo ĉijare, la kvin gastoj vizitis la urbon Ŝigiaĝuang kaj kelkajn vilaĝojn de Hebej-provinco. Iun antaŭtagmezon, ili venis al la Martiran Parkon en Ŝigiaĝuang kaj metis girlandojn sur la tombon de N. Bethune, kaj antaŭ la “Memorpavilono pri N. Bethune”, ili plantis kvar junajn pinojn.

Por helpi Ĉinion en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito, doktoro Bethune venis al Jan-an en printempo de 1938; nelonge poste li eklaboris en limregiono de provincoj Ŝanhi, Ĉahar kaj Hebej (La nomo de Ĉahar-provinco nun estis jam forigita). Bedaŭrinde Bethune oferis sian vivon sur la posteno en la 12-a novembro de 1939.

La nomitaj parencoj de kamarado Bethune volis viziti Ĉinion jam de longe. Dum sia restado en Ĉinio, ili laŭvice vizitis Pekinon, Ŝigiaĝuang, Ŝanhajon kaj Kantonon. Kiam la gastoj rigardis la lokojn, kie kamarado Bethune iam laboris, ili estis tre emociitaj. Ili diris, ke ili estas multe kuraĝigitaj de la fakto, ke la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ verkis speciale artikolon *Memore al Norman Bethune* por laŭdi la internaciisman spiriton de Bethune. Bethune havis du hejmlandojn, Kanadon kaj Ĉinion. Ili tre ĝojis, ke ĉifoje vizitante la lokojn, kie Bethune iam vivis kaj laboris, ili kvazaŭ venis al la hejmo.

Niujangoŭ estas montvilaĝo ĉe piedo de la orienta fino de Tajhang-montaro, en Tanghian, Hebej-provinco. En la jaro 1939, kiam kamarado Bethune militiris orienten kun la kuraca trupo, li venis al Tanghian, kie li laboris en pli ol dek

vilaĝoj, inkluzive Niujangoŭ, Gegongcun, Huatacun kaj Huapencun. En Niujangoŭ doktoro Bethune ne nur savis la vivon de vunditoj el la batalfronto, sed ankaŭ donis kuracartajn lecionojn al sanitariaj laborantoj de la armeo kaj kuracajn helpojn al malsanaj kamparanoj de la vilaĝo. Ĉifoje, kiam la vilaĝanoj informiĝis pri la veno de la parencoj de kamarado Bethune, ili ĉiuj frumatene kolektiĝis ĉe la enirejo de la vilaĝo por varme bonvenigi la gastojn.

En la korto de la hejmo de kamarado Ĝaŭ Hong-en, ĉe kiu kamarado Bethune siatempe loĝis, ĉinaj kaj kanadaj geamikoj sidis ĉirkaŭ kunigitaj tabloj plene provizitaj per grandaj pomoj kaj ruĝaj jujuboj, kaj intime interparolis. Inter tiuj estis familianoj de la dommastro, kunlaborintoj de kamarado Bethune, maljuna avino, kiun kuracis iam kamarado Bethune kaj aliaj. Ili kun sento de respekto parolis pri emociaj agadoj de kamarado Bethune, kiu varme servis tutkore al la ĉina popolo dum la militaj jaroj. La mastro speciale menciis, ke kvankam Bethune estis tre okupita per siaj profesiaj laboroj, tamen li ofte helpis al la dommastro balai la teron, vektporti akvon kaj mueli grenon.

La dekjar-aĝa nepeto de la mastro diris al la kanadaj onkloj: “Miaj geavoj ofte rakontis al mi pri Bethune. Mi nepre lernos de lia nobla spirito kaj fariĝos revolucia daŭriganto, laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ.” La kanadaj geamikoj estis tre kortuŝitaj kaj varme aplaŭdis lin. Poste la gastoj fotiĝis kune kun la familio de la mastro, mano en mano, antaŭ la ŝtonmuelilo. Sinjorino Cornell diris: “Ni pasigis la hodiaŭan tagon hejme en via domo kaj estas multe emociitaj de viaj rakontoj pri multaj aferoj koncerne al Bethune. Ankaŭ ni lernos de la internaciisma spirito de Bethune. Tre granda estas la amikeco inter la popoloj de



*Nie Jonggen intervidiĝas kun la parencoj de doktoro Bethune.*

Ĉinio kaj Kanado.” Je la adiaŭo, la mastro prezentis korbon da jujubegoj al la parencoj de Bethune kiel donacon. Kaj sinjorino Cornell donacis al la mastro du fotojn, unu el kiuj estis de Bethune kaj la alia de lia naskiĝloko.

En oktobro de 1939, doktoro Bethune toksigis pro vundiĝo de sia longa fingro dum faro de urĝa ĥirurgia operacio por ĉina vundita batalanto, kaj malfeliĉe oferis sian vivon sur la posteno, la 12-an de novembro en Huangŝikoŭ de la gubernio Tanghian. Kiam sinjorino Cornell kaj aliaj gastoj venis al Huangŝikoŭ, ili estis varme akceptitaj de la tuta familio de la dommastro, ĉe kiu gastis doktoro Bethune. La dommastro detale rakontis al la gastoj, kiel Bethune batalis obstine kontraŭ sia malsano, kaj kiel la ĉina popolo atenteme zorgis lin. Post lia morto, la ĉinaj popolo kaj armeo rezistantaj kontraŭ la japana imperiismo funebris lin per grandioza solena enterigo. La parencoj de doktoro Bethune estis multe kortuŝitaj, aŭdintion. Sinjorino Cornell diris: “Oni ofte opinias, ke estante en fremdaj landoj, oni sentas sin ne

hejme. Sed Bethune havis du hejmlandojn; Ĉinio estas la dua por li. Tial oni povas diri, ke Bethune estis enterigita en sia hejmlando inter parencoj.” Sinjorino Joan Lindley diris: “Ni parencoj de Bethune bone scias, ke li trovis bonan prizorgadon de la ĉina popolo antaŭ sia morto. Tio estas granda konsolo por ni. Vi kaj ni ĉiuj estas de la sama familio.”

La Revolucia Komitato de Tanghian donacis tri broditajn portretojn de kamarado Bethune al la kanadaj amikoj antaŭ la finiĝo de ilia vizitado. Ili akceptis emocie la portretojn, premante ilin al sia brusto. Sinjorino Cornell diris: “Kiom bona! Kiom valora! Kiam mi revenos hejmen, mi pendigos ĝin en mia ĉambro, por ke mi povu rigardi ĝin ĉiutage, kaj konservos ĝin por ĉiam.” Kiam la parencoj de Bethune forlasis Tanghian, multaj homoj el Niuĵangoŭ kaj Huangŝikoŭ iris al la gubernia urbo por adiaŭi ilin. Bedaŭrante la baldaŭan disiĝon, la kanadaj geamikoj diris: “Ni vere ne volas forlasi vin kaj la karmemoran lokon, kie Bethune iam laboris.” Kiam la aŭto-

mobilo ekmoviĝis, gesinjoroj Cornell kriis per ĉinaj vortoj, kiujn ili ĵus lernis: “Zajĝjan! Zajĝian!” (ĝis revido!)

La gastoj vizitis ankaŭ la Internacian Pacan Hospitalon Bethune de ĈPLA, kiu ricevis sian nomon pro tio ke tie doktoro Bethune laboris antaŭ sia morto. En la militaj jaroj, ĝi trovis sian lokon en iu templo sur monto kun tre simplaj ekipaĵoj. Nun ĝi jam fariĝis granda ĝenerala hospitalo kun 19 fakoj. La gvidantoj kaj personaro de la hospitalo varme akceptis la gastojn. Ili rigardis la pomĝardenon, bovinejon kaj drogherban ĝardenon de la hospitalo, kaj ankaŭ la Memoran Ekspoziciejon pri Norman Bethune. Ili vizitis la ĉambrojn de malsanuloj kaj varme deziris al la malsanuloj baldaŭan resaniĝon. Sur la festeno aranĝita honore al la vizitantoj la gastiginto diris: “Vi estas parencoj de Bethune, kaj ankaŭ de ni. Estu ĉi tie kiel hejme.” Levante pokalon Hugh Neily emociite diris: “Ĉifoje en Ĉinio ni vidis, ke la amikeco, semita de doktoro Bethune antaŭ 35 jaroj nun jam pompe prosperas. Ni kredas, ke ĝi certe ankoraŭ pli forte kreskos en venontaj jaroj.” Intertempe, en la nomo de la familianoj de Bethune, sinjorino Cornell donacis al la hospitalo fotografon

de Bethune kun lia tuta familio konservitan jam pli ol 60 jarojn. Ankaŭ la hospitalo donacis al la gastoj tri albumojn de fotoj pri la laboroj faritaj de Bethune en Ĉinio.

En posttagmezo de 18-a de majo, en la Popola Halo, Pekino, Nie Ĵongĝen, vicprezidanto de la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK, KPĈ, havis intiman interparolon kun la gastoj kaj varme laŭdis la noblan spiriton de kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, kiujn elmontris kamarado Bethune, kiam li laboris en ĉina bazloko dum la tempo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Li esprimis elkoran bonvenon al la parencoj de Bethune. En la nomo de la lastaj, sinjorino Cornell respondis: “Ni, parencoj de Bethune, ĉiam memoras kaj estimas lin. Dum restado en Ĉinio, ni havis ŝancojn intervidiĝi kun multaj kunbatalantoj-amikoj de nia onklo Bethune. Kvankam la vizitado estas mallonga, tamen ĝi estas tre bona travivaĵo por ni. Profunde impresis nin speciale la varma amo de la ĉina popolo al nia onklo. La varma akceptado, kiun ni trovis ĉie en Ĉinio, estos neforgesebla por ni. Ni raportos ĉion spertitan dum la vizito al la kanada popolo, kiam ni revenos al nia hejmlando.”



*La parencoj de Bethune estis varme akceptataj de la Internacia Paca Hospitalo.*



## **BATALO KONTRAŬ TER-ŜTONAJ FLUOJ**

En montozaj sudokcidentaj regionoj de Ĉinio, kiel en la provincoj Siĉuan, Junnan kaj Gujĝoŭ, troviĝas krutaj montoj kovritaj de abundaj argilo, sablo kaj ŝtonoj kaj ofte okazis ter-ŝtona fluo en pluvegoabunda periodo en somero kaj aŭtuno. Dum la okazo, torento kun granda kvanto da tero, sablo kaj ŝtonoj, eĉ ŝtonegoj pli-ol-mil-tunaj, fluas malsupren laŭ kruta intermonta sulko, kaj formis ŝtonan maron sur la malferma vastejo, kio kaŭzis gravan damaĝon al trafikado, industria kaj agrikultura produktado kaj popolaj vivoj kaj havaĵoj. La okcidenta montregiono de Siĉuan estas unu el la lokoj plej ofte atakataj de grava ter-ŝtona fluo.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj en kombino de scienca esplorado kun bezonoj de la socialisma konstruado, la laborantoj de la Siĉuan-a Geografia Instituto profunde venis en la basenon de la rivero Hejŝahe, unu el la ĉefaj lokoj, kie ofte okazas ter-ŝtona fluo, por fari enketadon kaj esploron, kaj klare ekkonis la tieajn geomorfologion, geologion, hidrologion, klimaton kaj grundon, kaj, resuminte kaj profitante la spertojn de amasoj en kontraŭbatalo al ter-ŝtona fluo, ellaboris la sintezan regan projekton por superregi ĝin, nome: konstrui akvorezervejon ĉe la supra parto de la rivero, sablobaran digon sur la meza parto, fluokondukan digon ĉe la malsupra parto. Post efektivigo de tiuj paŝoj ter-ŝtona fluo ne okazis dum la lastaj du jaroj en la regiono. Farinte enketadon kaj esploron pri fluejoj de ter-ŝtona fluo en Junnan kaj Gujĝoŭ, ili ellaboris projekton por superregi ĝin por tiuj regionoj, kiu estis akceptita de tieaj aŭtoritatoj.

## **NOVA HIDROELEKTREJO DE GUANGDONG**

Nova hidroelektrejo estis konstruita antaŭ nelonge en Fengŝuba, Guangdong-provinco. Ĝia unua 75,000-kilovata generatora kompleto jam eksendis al ĉirkaŭaĵo elektron.

La elektrejo situas sur la meza parto de la Orienta Rivero. Ĝia funkciado ne nur donis novan elektran fonton al la loko, sed ankaŭ altigis la kapablon de la Orienta Rivero en evito de inundo kaj en trafikado. En la pasinteco dum sezonoj de akvomanko sur la rivero ne povis veturi 20-tonela ŝipo, sed nun dank' al reguligado de la fluo kaj enordigado de la riverlito, sur 100 kilometrojn longa parto de la Orienta Rivero supre de ĝi, povas veturi ŝipoj pli-ol-100-tonelaj kaj malsupre de ĝi 12,000 hektaroj da kampoj estas sekurigitaj kontraŭ inundaj katastrofoj, kaj la areo de kultureblaj kampoj ambaŭborde de la rivero plimultiĝos per pli ol 6,000 hektaroj.

## **DISVOLVIĜO DE BRULGASA PROVIZADO EN URBOJ**

Multe disvolviĝis liverado de brulgaso en niaj urboj ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio. Statistiko montras, ke en la periodo de 1965 ĝis la unua trimestro de 1974, la urboj, kiuj provizas brulgason al siaj loĝantoj, plimultiĝis de 16 al 31 en la tuta lando, totala provizita kvanto kreskis per 1.5-oblo kaj la nombro de loĝantoj, kiuj uzas brulgason, per pli ol 2-oblo. La uzado de brulgaso de la urboj ne nur ŝparis karbon, akcelis industrian produktadon kaj faciligis la popolan vivon, sed ankaŭ reduktis polucion de la urba medio kaj plibonigis iliajn higienajn kondiĉojn. Plie, la fontoj de gasoj ankaŭ pliriĉiĝis, krom la gaso distilita el karbo, estas uzataj kunekzistanta gaso de olekampo, natura gaso, likvigita petrola gaso de petrolrafinejo, karbomineja gaso, gaso el koaksoforno de koaksigejo kaj brulebla gaso eliminata de kemisterkejo.



# Dung-nacieco

de ZONGMIN

**D**UNG-NACIECO estas unu el la ĉinaj naciecoj havantaj longan historion. Ĝiaj ĉ. 830,000 membroj dislokiĝas ĉefe en interligitaj limregionoj de la provincoj Gujĝoŭ kaj Hunan kaj Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, inter kiuj pli ol duono troviĝas en Gujĝoŭ. En iliaj lokoj loĝas ankaŭ aliaj frataj naciecoj hanoj, mjaŭ-oj, ĝuang-oj, ŝuj-oj, buji-oj kaj jaŭ-oj. En la longa historia periodo, dung-oj kaj aliaj naciecaj popolanoj kune laboris, lernis unu de alia kaj formis inter si fratan amikecon.

Frue en la periodoj de Kin- kaj Han-dinastioj (221 a.K. — 189 p.K.) multaj gentoj, kiuj koncentre loĝis en regiono de nunaj Guangdong kaj Guanghi, havis komunan nomon *luojue*. Post la dinastioj Vej kaj Gin tiuj gentoj estis alinomitaj *liaŭ*. Laŭ registro de la historiaj libroj dung-oj apartenis

al unu el partoj de liaŭ-oj. Nun dung-oj disloĝas najbare de ĝuang-oj, ŝuj-oj kaj maŭnan-oj, iliaj lingvoj ĉiuj apartenas al la ĝuang-dung-a lingvo-familio, kaj ankaŭ iliaj moroj kaj kutimoj estas multe samaj. Ĉio ĉi tio montras, ke dung-oj estas unu el la branĉoj de luojue-oj.

Dung-naciecaj regionoj havas abundajn produktaĵojn kaj naturajn riĉfontojn. Tie la grenplantaĵoj estas ĉefe rizo kaj ankaŭ milio, batato, maizo kaj tritiko. La ekonomiaj plantaĵoj estas kotono, tabako, aleŭrito, olea kamelio kaj kolzo. La indiĝenaj kaj specialaj produktaĵoj estas smilako, *ŝaŝen* (*Adenophora stricta*), liriopo, bova bezoaro kaj juglando. Tie abunde produktiĝas ankaŭ sekvojoj. Post la Liberiĝo ĉiujare kelkcent mil kubmetroj da sekvojaj lignoj estas transportitaj al aliaj lokoj por subteni socialisman konstruadon

*Dung-naciecaj virinoj*



de la lando. Krome, tie subtere konserviĝas abundaj mineraloj, kiel karbo, fero, hidrargo, fosforo, sulfuro kaj asbesto kaj iuj el ili estas grandkvante ekspluatataj.

La dung-naciecaj popolanoj ekspluatis siajn montregionojn per longtempa diligenta laborado. Ili kreis multajn ŝtuparajn kampojn sur montoj kaj konstruis diversgrandecajn kanalojn, akvobaraĵojn kaj lagetojn sur krutaj deklivoj. Agrikulturo tie estas relative evoluinta.

Inter metiartaĵoj de dung-oj estas helkoloraj brodaĵoj kaj mantukoj kun delikataj desegnoj. Dung-aj ŝtofoj estas tre fortikaj, inter kiuj ŝtofo de Sanbaŭ de Ĵonggiang ĝuas plej grandan renomon. Ankaŭ plektaĵoj, gravuraĵoj, papertondaĵoj kaj bambuaj, lianaj kaj lignaj iloj ĉiutage uzataj estas delikataj.

En sia produktado la dung-naciecaj popolanoj akumulis riĉajn sciencajn kaj teknikajn sciojn pri agrikulturo, meteorologio, medicino kaj fandado kaj ankaŭ kreis belajn popolajn literaturon kaj muzikon. Kantado estas tre populara inter dung-oj.

*Propaganda taĉmento de produkta brigado prezentas programon spegulantan Dung-naciecan vivon.*



Iliaj kantoj ĝenerale konsistas el kvar specoj, nome granda, malgranda, rakonta kaj ceremonia kantoj. La rakonta kanto estas longa kun paroloj kaj akompanata de bivo. La ceremoniaj kantoj plejparte estas ĥoraĵoj. Por festaj tagoj dung-oj havas tradiciajn ceremoniajn kantojn.

Inter multaj muzikiloj de dung-oj, la ĉefaj estas granda, mezgranda kaj malgranda bivoj, kiujn oni ludas por akompani dung-ajn kantojn, kaj bovĝamba violono, kiu estas farita el sekvoja ligno, kies formo similas al bovĝambo kaj ludmaniero al tiu de violono. Dung-oj ludas ankaŭ aliajn muzikilojn, kiel dukorda arĉa instrumento, luna gitaro, zimbalo, surnao, tamtamo, tamburo, cimbalo, sonorilo, markonko kaj korno.

Dung-aj vilaĝoj plejparte sin trovas apud montoj kaj riveroj. La pli grandaj vilaĝoj havas 500-600 familiojn kaj malgrandaj 40-50. En regiono kun pli evoluinta ekonomio troviĝas vilaĝoj de pli ol mil familioj.

Tamburturo estas konstruaĵo kun aparta stilo en dung-aj vilaĝoj. Tia konstruaĵo troviĝas preskaŭ en ĉiu vilaĝo en Liping, Conggiang kaj Ĵonggiang de Gujĝoŭ, Tongdaŭ de Hunan, Sangiang kaj Longŝeng de Guanghi. Kun alteco de ĉirkaŭ 15 metroj ĝi superrigardas la vilaĝon kiel pagodo. Antaŭ la Liberiĝo plejparto de la tamburturoj estis posedataj de bienuloj kaj vilaĝmastroj. Post la Liberiĝo ili fariĝis lokoj, kie laborantaj popolanoj sin amuzas kaj studas, kaj iuj el ili estas uzataj kiel vesperaj kulturaj kaj politikaj lernejoj.

Dung-a arkitekturo havas longan historian tradicion. Iliaj ordinaraj loĝdomoj el ligno havas karakterojn de ekonomio, fortikeco kaj belaspekto. En pli grandaj vilaĝoj oni konstruis imponajn kaj elegantajn pontojn kaj pavilonojn kiel komunajn konstruaĵojn. Plejparto de la pontoj estas konstruitaj en gravaj trafikejoj ĉe vilaĝoj. Krom pontoj kun ligna strukturo troviĝas ankaŭ arka kaj plata ŝtonpontoj, bambuaj flospontoj kaj aliaj, inter kiuj la plej okulfrapa estas koridora ponto kun tegmento. Tia ponto super Pingtan-rivero en Pingji-vilaĝo en Tongdaŭ-gubernio de Hunan-provinco longas je 58 metroj kaj larĝas je 4.5 metroj. Kies pilieroj estas masonitaj per bluŝtonoj kaj pontplanko farita el sekvojaj lignopecoj. Sur la pontplanko oni konstruis longan koridoron kaj meze de la koridoro oni faris tri pagodformajn tegmentojn. Super Pingtan-rivero longa je dek kilometroj troviĝas 7 tiaj pontoj. Ankaŭ Ĉengjang-ponto de Sangiang-a Dung-nacieca Aŭtonoma

Gubernio de Guanghi estas tre impona kaj konservata kiel unu el la gravaj kulturaj restaĵoj de la tuta lando.

Dung-oj havas tradicion de longa revolucia batalo. En la longa historia periodo dung-oj faris sennombrajn obstinajn batalojn kontraŭ reaciaj regantaj klasoj de ĉiuj dinastioj. En la 11-18-aj jaroj de Hongvu-erao de Ming-dinastio (1378-1385 p.k.) dung-oj faris grandan levigon kontraŭ subpremado kaj ekspluatado. En la 5-a jaro de Hianfeng-erao de King-dinastio en 1855 p.K. eksplodis en dung-aj regionoj granda kampana insurekcio kun Giang Jingfang kiel gvidanto sub influo de la revolucia movado de Tajping-a Ĉiela Regno. Ĝi batalis ŝultron ĉe ŝultro kun kampana armeo de mjaŭ-oj kun Ĝang Hiuj kiel gvidanto kaj persistis en batalo 18 jarojn. Post la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio en 1921 dung-oj kune kun diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando partoprenis en revolucia batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. En la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito nemalmultaj dung-oj partoprenis en Norden-Ekspedicia Milito de 1926-1927. En 1930, kiam la sepa kaj oka armeoj de la Laborista-Kampana Ruĝa Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio marŝis Norden de la Dekstra kaj la Maldekstra Riveroj de Guanghi al la centra soveta bazloko en Gianghi, ili preterpasis Ĵonggiang kaj aliajn lokojn, kaj en 1934, kiam la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo preterpasis Tongdaŭ, Liping, Ginping, Ĵonggiang dum la Longa Marŝo, ĝi disemis tie revoluciajn fajrerojn. En la Kontraŭ-japana Rezistmilito multaj elstaraj gefiloj de dung-oj oferis sian vivon por defendi la patrolandon. En la Liberiga Milito dung-oj de Longŝeng en Guanghi kune kun alinaciecaj popolanoj faris armitan batalon sub la gvido de la Partio.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio dung-aj popolanoj venke plenumis la demokratian reformon kaj socialisman transformon kaj starigis Mjaŭ- kaj Dung-naciecan Aŭtonoman Subprovincon en sudoriento de Gujĝoŭ, tri dung-naciecajn aŭtonomajn guberniojn Sangiang, Tongdaŭ kaj Hinhuang kaj Longŝeng-an Unuigitan Aŭtonoman Gubernion de Diversaj Naciecoj inkluzive de dung-oj, kaj estas grandnombre kulturitaj la nacimalplimultaj kadroj. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, dank' al la spirito de penema lukto kontraŭ malfaciloj kaj sinapogo sur propraj fortoj, dung-oj disvolvis industrian kaj agrikulturan produktadon kaj kulturan kaj edukon afe-

rojn. En la Mjaŭ- kaj Dung-nacieca Aŭtonoma Subprovinco en sudoriento de Gujĝoŭ konstruiĝis de 1967 pli ol 1,100 grandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj, kies totala kapacito de instalitaj generatoroj estas ĉirkaŭ 3-oblo de tiu de pli ol dek jaroj antaŭ la granda kultura revolucio. La Tongdaŭ-a Dung-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Hunan starigis pli ol 8,000 akvoutiligajn konstruaĵojn, inkluzive 447 montlagetojn kaj akvorezervejojn kaj 131 malgrandajn hidroelektrejojn, tiel ke plejparto de agrikulturaj kampoj ricevis racian irigacion. La tuta gubernio havas pli ol 8,300 agrikulturajn maŝinojn, la gubernio kaj komunumoj starigis staciojn por disvastigo de agrikultura tekniko kaj fondis vicaron de agrikulturaj teknikistoj. Antaŭ la Liberiĝo, Tongdaŭ-gubernio havis nur kelkajn metiejojn de feraĵoj, sed nun jam starigis fabrikon de agrikulturaj maŝinoj, cementopreparejon, riparojn de elektraj instrumentoj, amelopreparejon, trikejon, presejon, alkoholpreparejon kaj aliajn 59 fabrikojn, kaj ankaŭ malgrandajn fer- kaj karbminejojn. En la jaro 1972, la totala produktokvanto de greno de la tuta gubernio kreskis de pli ol 40,000 tunoj de 1964 ĝis 60,000 tunoj, t.e. je 50 procentoj. En pli ol 1,000 produktaj grupoj de Liping-gubernio, kie koncentre loĝas dung-oj, oni uzas elektron en prilaboro, irigacio kaj lumigado. Por ĉiam forpasis la tagoj de dung-oj, kiam ili uzis kenon por lumigado kaj la naturo decidis rikolton.

Dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio la progresintaj kulturo, sciencoj kaj teknikoj estas rapide disvastigitaj en dung-aj regionoj. En agrikulturo, en multaj lokoj oni aplikas sciencan metodon en kultivado kaj plantas rizon dufoje en ĉiu jaro anstataŭ unufoje, kio multe grandigis la produktokvanton. Post kiam Linhi-komunumo de Sangiang-a Dung-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Guanghi ekplantis rizon dufoje de 1969, oni akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn kaj produktokvanto de greno de 1973 pliiĝis je 9.1% kompare kun tiu de la riĉrikolta jaro 1972.

Nun dung-oj en diversaj lokoj profunde disvolvas la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj sane kaj grandnombre kreskas junaj revoluciaj daŭrigantoj en la batalo. La edukado de lernejo ricevas ĝeneraligon kaj altigon; komunumoj kaj brigadoj starigis hospitalojn kaj sanitarejojn, kaj kampanaj kuracistoj aktivadas en ĉiuj vilaĝoj.

Laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, dung-oj brave antaŭenmarŝas sur la granda vojo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.




## Ĉina Geografio

# La ĉina flaŭro

**E**N Ĉinio troviĝas ĉ. tridek mil specoj de altklasaj vegetaloj. Preskaŭ ĉiuj specoj de flaŭro en la norda hemisfero kreskas en nia lando. De la sudoriento ĝis la nordokcidento Ĉinio havas humidan, duonsekan kaj sekan klimatojn pro la influo de oceanaj musonoj kaj konforme al tio formiĝis tri flaŭraj zonoj de arbaro, stepo kaj dezerto. La areo de la agrikultura flaŭro okupas nur 11% de tiu totala de la tuta lando. La vastaj natur-flaŭraj zonoj estas nun paŝo post paŝo ekspluatataj, utiligataj kaj reformataj.

### HUMIDA ARBARZONO

En tiu zono troviĝas arbaroj de malvarma varmetzono, varmeta zono, subtropika kaj tropika zonoj. La regiono havas longan kulturan historion kaj multegan loĝantaron, tial ĝiaj ebenaĵoj kaj malaltaj montetoj fariĝis agrikulturaj kampoj, nur sur montoj ankoraŭ konserviĝas naturaj arbaroj,



*Olepalmaro sur Hajnan-insulo*

kiuj havas du mil specojn kaj plejparto de ili apartenas al bonspeca ligno.

**Regiono de falfoliaj kaj pinglofoliaj arbaroj en malvarma varmetzono:** En la Granda Hin-an-montaro plejnorde de Ĉinio disetendiĝas densaj pinglofoliaj arbaroj, kvazaŭ “arbomaro”. Tie, krom granda kvanto da frosteltenemaj larikoj, kreskas ankaŭ piceo, pino kaj aliaj ĉiamverdaj pinglofoliaj arboj. Iliaj malmolaj lignoj estas bonaj materialoj por farado de ŝipo, veturilo, papero, muzikaj instrumentoj k.a. Tiu regiono servas kiel unu el la plej gravaj ligno-provizaj bazlokoj de nia lando.

**Regiono de la falfolia kaj larĝfolia arbaroj en varmeta zono:** En la montregiono de la nordorienta Ĉinio kreskas miksaĵaj arbaroj de ulmo, acero, tilio, betulo, frakseno kaj ankaŭ ruĝa pino (*Pinus koraiensis*), kiu havas rektan trunkon kaj grandan rezistemon kontraŭ premo. Kelkaj el la domoj en la

Malnova Palaco estis konstruitaj per tiaj pinoj. En la montregiono de la norda Ĉinio kaj en duoninsuloj de Liaŭdong kaj Ŝandong troviĝas kverkaroj kaj miksaĵoj de kverkoj kaj ĉinaj pinoj (*Pinus tabulaeformis*). La foliojn de kverkoj oni uzas por bredi silkraŭpojn. La lokoj estas ankaŭ ĉefaj produktaĵoj de falfoliaj fruktaroj en Ĉinio. Tie abunde produktiĝas pomo, piro, persiko, vinbero, jujubo, persimono, juglando, kaŝtano kaj aliaj. Iliaj ebenaĵoj ĉiuj estas agrikulturaj kampoj kaj estas gravaj produktaĵoj de tritiko, kotono kaj aliaj grenoj de la lando.

**Regiono de la ĉiamverdaj larĝfoliaj arbaroj en subtropika zono:** En la vasta subtropika zono de Ĉinio troviĝas abundaj vegetaloj. Ekzemple Siĉuan-provinco sola havas ĉ. 10,000 specojn de altklasaj vegetaloj. Sur la montdeklivoj kaj en la montvaloj de tiu ĉi regiono kreskas tutjare ĉiamverdaj arbaroj kun ovalaj folioj. En aliaj regionoj de la sama latitudo en la mondo troviĝas ankaŭ subtropikaj arbaroj, tamen ilia areo en Ĉinio estas plej vasta. Dum la regionoj de la sama latitudo en Afriko, sudokcidenta Azio kaj meza Ameriko plejparte estas okupitaj de dezertoj kaj stepoj pro seka klimato.

La subtropika arbarregiono de Ĉinio ne nur estas vasta, sed ankaŭ havas rarajn vegetalojn ne-troveblajn en aliaj lokoj de la mondo. Multaj vegetaloj vaste kreskintaj sur la terglobo en kretaceo


nun fundamente malaperis pro la influo de la glaciaj riveroj en kvaternaro. Sed en Ĉinio la subtropika zono estis ne tute kovrita de glaciriveroj, tiel ke la loko fariĝis "azilo" de iuj vegetaloj en la paleogeologia epoko. Ekzemple, ginkoj ĉie troviĝintaj siatempe, nun kreskas nur en la sudokcidenta Ĉinio, sed en multaj lokoj de la mondo oni povas vidi nur iliajn fosiliojn. Ginko povas vivi mil jarojn kaj ĝia ligno estas uzata por gravurado, desegnado kaj domkonstruado; ĝiaj semoj estas manĝeblaj kaj uzataj kiel kuracilo utila al la pulma funkciado, kaj ankaŭ ĝiaj folioj servas kiel medikamento. Ankaŭ metasekvojo kreskanta en la limo inter la provincoj Siĉuan kaj Hubej estas arbospeco postresta de kretaceo. Kun forta akomodeco al la medio ĝi bone kreskas en la sudo kaj nordo de Ĉinio. La postrestinta *Cathaya argyrophylla*, kiu vaste kreskis sur la terglobo antaŭ miliono da jaroj, estis trovita sur la montoj sude de Siĉuan kaj norde de Guanghi en la jaro 1957.

En la subtropika zono troviĝas ankaŭ diversaj ekonomiaj arbaroj. Iuj montdeklivoj estas plenkovritaj de verda "maro de bambusoj". La ruĝgrundaj sovaĝejoj antaŭ la Liberiĝo jam fariĝis nun grandaj teo-ĝardenoj kaj multaj montdeklivoj kovriĝis per ekonomiaj arbaroj, ekz., la oleo de olekamelio estas unu el la ĉefaj manĝeblaj oleoj por la sudanoj de Ĉinio; la semoj kaj gumo de aleŭrito, *Sapium sebiferum* kaj anakardiujo estas materialoj

*Laboristoj de Lingvu-kultivejo de Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono semas tritikon.*



*Arbotrunkoj estas ekspedataj de Kiangin-arbohakejo de Hejlong-giang-provinco.*



por prepari fajnan lakon kaj kemiajn oleaĵojn. Ĉie en tiu regiono kreskas sekvojo kaj ĉevalvosta pino (*Pinus massoniana*) kiuj estas ofte uzataj kiel domkonstruaj materialoj. En la lastaj jaroj ili estas grandaree plivastigitaj pro dissemado de aeroplanoj.

La montoj 4,000 metrojn altaj super la mara nivelo en la okcidenta parto de Siĉuan de nia lando en subtropika zono estas kovrataj de diversspecaj arbaroj, en kiuj vivas grandaj pandoj ŝatantaj malvarman varmetan klimaton.

Tiu regiono estas ĉefa rizproduktejo de Ĉinio.

**Pluvabunda regiono de arbaroj en tropika zono:**

En la sudaj partoj de Guangdong, Guanghi, Fugian, Tajvan kaj Junnan en la suda Ĉinio, la jara pluvokvanto estas 1,200-2,000 milimetroj. En montoj kie arbaroj estas bone protektataj, dense kreskas multspecaj arboj altaj kaj malaltaj, ĉiamverdaj kaj larĝfoliaj. La plej alta arbo povas atingi 40 metrojn kaj ĝin volvas grimpoplantoj de diversaj dikecoj. En la margolfoj sub la tropika zono oni povas vidi manglarbaron.

En tiu regiono troviĝas ankaŭ tropikaj ĉiamverdaj fruktĝardenoj kaj ĝardenoj de ekonomiaj plantoj, ekzemple arboj de banano, liĉio, longano, mango, areko, kaj ekonomiaj plantoj de kaŭĉuko, kokoso, kafo, kokao, pipro kaj olepalmo. Krome estas ankaŭ kampoj de ananaso, sukerkano kaj agavo. La provincoj Guangdong kaj Tajvan abun-

de produktas sukerkanon kaj kamforon. Tajvan estas la plej fama produktejo de kamforo en la mondo.

**DUONSEKA STEPZONO**

**Stepregiono en varmeta zono:** En la Nordorienta Ebenajo kaj la orienta parto de la altebenaĵo de la Interna Mongolio estas vasta stepo ĉefe kun plurjaraj graminaj kaj herbaj vegetaloj pro duonseka klimato. Tiuj herboj, ekz. gresoj de legumencoj kaj aliaj, entenas relative altvaloran nutraĵon, tial tiu regiono fariĝis la ĉefa paŝtejo de nia lando.

Multaj lokoj en la regiono jam disvolviĝis en agrikulturajn regionojn. Sur la stepo de la nordorienta Ĉinio, stariĝis multaj ŝtataj kultivejoj kaj paŝtejoj, kiuj produktas sojfabon, sorgon kaj sukerbeton. La riverkurbiĝa regiono de la Flava Rivero en la Interna Mongolio kaj Ninghia jam fariĝis "grenejo" norde de la Granda Muro dank' al irigaciado per akvo de la rivero. La stepoj sur la Loesa Altebenaĵo estis tute ekspluatataj en agrikulturajn kampojn.

**Malvarmega regiono de herbejoj kaj stepoj:** En la centra, orienta kaj suda partoj de Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo 4,000 metrojn altaj super la mara nivelo ne ekzistas somero en la tuta jaro. Tie troviĝas multaj marĉoj, lagoj kaj fekundaj herbejoj formiĝintaj pro degelo de la glaciriveroj sur la montoj. Stepoj ĝenerale troviĝas sur montdeklivoj vizaĝe

*Sur Ĉaka-stepo de Ulan-gubernio de Kinghaj-provinco*



al la suno. Gruntbovoj kaj tibetaj ŝafoj estas la ĉefaj brutoj en la lokoj. En valoj sur la altebenaĵo oni kulturis printempan sekalon, rafanon kaj aliajn frostrezistajn plantojn. Post la Liberigo, oni jam sukcesis kulturi vintran sekalon, travintran tritikon kaj fagopiron en iuj lokoj.

## SEKA DEZERTZONO

**Dezerta regiono en varmeta zono:** Hingiang, Gansu kaj Caidam-baseno en Kinghaj sin trovas en varmeta zono. Tie en dezertoj kaj Gobio vegetaloj estas malabundaj kaj raraj kaj eĉ neniam en iuj lokoj.

En la dezertoj kreskas *Haloxylon ammodendron* uzata kiel hejtajo kaj konstrumaterialo, artemizio kapabla al senmovigo de sablo kaj maldensa purpura saliko; kaj en Gobio kreskas *Elaeagnus umbellata* kaj ĉina efedro (*Ephedra sinica*). Krom ĉina efedro la supre diritaj vegetaloj ĉiuj estas fajnaj furaĝoj por kamelo. En la dezertoj tie, kie troviĝas subtera akvo sub maldika tertavolo, kreskas iaj poplaj (*Populus enphatica*), kiuj havas du specojn de folioj — la unuaj similas al tiuj de poplo kaj aliaj al saliko. La poplo estas la ĉefa arbo por ligna uzo

en la dezertoj kaj ĝiaj folioj estas bona furaĝo por kamelo kaj ŝafo.

En malaltejoj sur altaj montoj de la regiono troviĝas vastaj stepoj kaj herbejoj kiuj servas kiel bonaj paŝtejoj, kaj sur la altejoj de la montoj kreskas arbaroj por ligna uzo. La degelinta glacineĝo sur la montpintoj irigacias oazojn en la dezertoj ĉe la montpiedo. Tiu regiono estas la produkto de la plej bonkvalita kotono kun longaj lanugoj en nia lando. La forta sunbrilo kaj granda temperatura diferenco inter tago kaj nokto en multaj basenoj tre favoras al akumuligo de sukero, tiel ke la lokaj vinbero, akvomelono kaj hami-melono tre famas pro sia dolĉeco.

**Malvarmega dezertregiono:** En la nordokcidenta parto de Tibeto 5,000 metrojn alta super la mara nivelo malpli multe kreskas vegetaloj. Tie vidiĝas nur malaltaj arbustoj kiuj kreskas kunpreme kaj rampe sur la tero por rezisti kontraŭ vento kaj frosto kaj konservi akvon. Apud lagoj kaj ĉe riverbordoj kreskas frostrezistema kaj sekeceltenema arbo ruĝa *ŝujjangĝi* kun verdaj folioj kaj ruĝaj floroj en somero. La neĝmontoj, lazuraj lagoj kaj ruĝaj floroj de *ŝujjangĝi* formis apartan belan pejzaĝon de la Nord-tibeta Altebenaĵo.



*Riĉa rikolto de sekalo sur vasta areo de Tibeto*



# “Kiel Ĉinio plibonigas laborprotektion?”

**E**N la pasintaj tempoj, laborakcidento kaj profesiaj malsanoj ĉiam minacis la vivon kaj saĝon de laboristoj. Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio, oni senĉese klopodis por plibonigi laborkondiĉojn kaj donis grandan atenton al prevento kaj kuraco de profesiaj malsanoj, tiel ke la laborprotekto de nia lando radike pliboniĝis.

Ĉi-sube ni prezentos la laborprotektan staton de la minejo Hikuangŝan de Hunan-provinco.

La minejo situas ĉe la piedo de Hjuéfeng-monto. Kiam oni venis al ĝia galerio kun profunde de kelkcent metroj, oni vidas ke ĉiuj ministoj surhavas ŝaktistan kostumon, sekurigan kaskon kaj blankan kontraŭpolvan buŝumon. Iuj el ili manipulas pneŭmatajn borilojn, aliaj elektrajn erpilojn, kaj la triaj ŝarĝmaŝinojn. Aerumtuboj kaj akvotuboj bonorde viciĝas sur la muroj de galerio. Elektraj lokomotivoj veturas sur la trakoj. En la fosejoj la elektraj lampoj brilas, la aerumtuboj enkondukas freŝan aeron.

Sed en la malnova Ĉinio, tie estis tute alia bildo plena de korporema mizero. De la jaro 1898 ĝis la jaro 1949, pro ekstreme malbonaj laborkondiĉoj pli ol 150,000 laboristoj mortis pro laborakcidento kaj profesiaj malsanoj. Meznombro ĉiutage mortis naŭ homoj. Inter ili pli ol 90,000 homoj mortis de silikozo. Tiam ministoj malfacile laboris per pezaj marteloj sur malfortikaj lignaj ŝtuparetoj apogantaj sur rokmuro ofte en alteco de pli ol dek metroj. Transportistoj kovris sian dorson per pajlomato kaj portis ercon pezantan pli ol cent kilogramojn tra mallarĝa, glita kaj malalta galerio, rampante per manoj kaj piedoj. Tie ne troviĝis ekipaĵoj por aerumi nek protektiloj kontraŭ pulvoro, tiel ke fumo de eksplodiloj, ercpulvoro kaj fulgo de kerosenaj lampoj saturis la maldensan aeron en la mino, kiun enspiris la ministoj. Tial

multaj suferis silikozon. La vivon de kvin el dek fratoj de ministro Jang Kianhiaŭ forrabis tiu malsano.

En la fino de la 19-a jarcento, la minejo komencis esti ekspluatata, kaj transfalis en la manojn de pluraj imperiismaj landoj de unu al alia, kiuj entreprenis senskrupulan prirabadon, en koluzio kun ĉinaj burokratoj kaj kompradoroj, ĉasante plej altan profiton kaj valoran materialon kontraŭ malalta pago neniam konsiderante pri laborprotekto por la ministoj. En 1934, pli ol 200 ministoj en unu fojo estis enterigitaj vivaj kaŭze de falo de minplafono.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ministoj liberiĝis el tiu “infero” kaj fariĝis mastroj de la minejo.

La popola registaro aparte zorgas por faciligi la laborojn de ministoj, radike ŝanĝis la malbonajn laborkondiĉojn postlasitajn de la malnova socio kaj, paŝon post paŝo, efektivigis mekanikigon kaj duonmekanikigon de la ĉefaj procedoj: minado, erco-elektado, metalurgio kaj transportado.

Por preventi falon de minplafono kaŭze de variado de premforto de la tero, la minejo plenigis multe da elĉerpitaj fosejoj, aplikas malsekan procedon en borado de roko kaj ercofosado, kaj starigis specialajn trupojn por ripari la galeriojn kaj forigi malfirmajn ŝtonojn, post la Liberiĝo. Estas starigitaj mekanika aeruma sistemo, mekanika akvoŝprucigo kaj kompleta kontrola sistemo pri kvanto de aerumo, pulvoro kaj akvo en la mino. Oni faras periode ĝeneralan ekzamenon pri aeruma kaj kontraŭpulvora aranĝaĵoj, plifortigas personan protekton kaj samtempe faras sciencan esploron kaj teknikan renovigon pri pli bona aerumado kaj reduktado de pulvormalutiloj kaj sintezan kuracon de silikozo.

La pulvora denseco en la aero en multaj laborpunktoj de la minejo longe restas laŭ higiena normo postulata de la ŝtato kaj la minaco de pulvoro estas fundamente eliminata.


La minafera administracio ĉiujare entreprenas ĝeneralan ekzamenon al la laboristoj, kiuj laboras en medio kun pulvoro, por trovi malsanulojn kaj doni tuj kuracajn helpojn aŭ ŝanĝi ties laborlokon.

La ŝtato senpage provizas la laboristojn per laborkostumo, laborbotoj, sekuriga kasko, kaŭĉu-kaj mantelo kaj pantalono, laborgantoj, buŝumo, sapoj, okulvitroj kaj aliaj korpoprotektiloj. Laboristo laboranta en mino ricevas ankaŭ laborprotektan subvencion krom tiuj materialoj, ĉiujare, kostantaj kune pli ol 200 juanojn. La laboristoj, kiuj laboras en medio kun pulvoro, venenaĵo,

venengaso, en alta temperaturo aŭ en alta loko, ricevas unufoje en ĉiu tago senpagan manĝon kun alta nutrovaloro.

La nomita minejo havas unu hospitalon kun sufiĉaj kaj bonaj ekipaĵoj, unu laboristan sanatorion, tri kuracejojn kaj ses sanitariajn staciojn, kun sume pli ol 200 malsanulaj litoj kaj pli ol 130 medicinaj laborantoj. La laboristoj ricevas kuracadon senpage por si, kaj duonkoste por siaj familiaĵoj. Ankaŭ la maljunaj laboristoj, kiuj ekhavis silikozon en la malnova socio, povas loĝi en la hospitalo por kuraco kaj ricevi originan salajron plus subvencio.

Pro tio la laboristoj emocie diras: “En la sama minejo, antaŭ kaj post la Liberiĝo: du malsamaj mondoj.”



## KORESPONDA EDUKADO DE INTELEKTAJ JUNULOJ EN KAMPARO

Por helpi intelektajn junulojn en la kamparo studi revoluciajn teoriojn kaj kulturajn kaj sciencajn sciojn en kombino kun praktiko, pli ol dek sciencaj institutoj kaj altlernejoj en Ŝanhajo funkciigas postlaboran lernejon korespondan por la intelektaj junuloj en provincoj Hejlonggiang, Gilin, Junnan, Gianghi kaj Anhuj.

Tiu koresponda lernejo ekskluzivis la influojn de la reviziisma eduka linio antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, ke la eduko sin apartigis de laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj de praktiko. La lernantoj estas kolektitaj laŭ la metodo en tri paŝoj: sinanonco, rekomendo fare de la amasoj kaj sankcio de la gvidantoj. Laŭ la realaj bezonoj en la kamparo oni difinis 3 kategoriojn de lernobjektoj: politikon kaj lingvon, agrikulturajn sciojn kaj medicinon-higienon. Laŭ la lernobjekto kaj loĝloko, la lernantoj organiziĝas en grupojn por fari memstudon kaj disku-

tadon. Se leviĝas problemoj, ili povas turni sin al koncernaj institutoj por peti klarigojn koresponde. Kaj la lastaj ankaŭ periode sendas personojn al ili por doni lecionojn kaj funkciigi mallongtempajn kursojn.


Nun tia edukado estas provata en la supre menciitaj kvin provincoj kaj en ĝi partoprenis jam 30,000 intelektaj junuloj.

## MALGRANDAJ HIDROELEKTREJOJ EN HINGIANG

Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, prospere disvolviĝas la konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj en vilaĝoj kaj paŝtejoj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Laŭ statistiko, de la jaro 1966, en la tuta regiono konstruiĝis kaj funkcias 115 malgrandaj hidroelektrejoj, kies totala kapacito de instalitaj generatoroj estas 1.4-oblo de tiu antaŭ la granda kultura revolucio. Nun pli ol 90 procentoj de la gubernioj havas siajn malgrandajn hidroelektrejojn, kiuj ludas gravan rolon en akcelado de agrikultura kaj brutbreda produktado de Hingiang, disvolvo de lokaj industrioj kaj plibonigo de vivo de la diversnaciecaj popoloj.

# Trovo de Perdinto

pentrita de **Guoliang**



Sur la Kovrilo:

Analizistino

Sur la Dorskovrilo:

Rikoltado de tritiko

# EL POPOLA ĈINIO 中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 9 (194) 1974

## Ĉefa Enhavo

Kreskado de ni virinaj kadroj .....	1
Pri la batala vivo de laboristinoj de la Ŝanhaja 22-a Kotona Tekstila Fabriko .....	7
Elektristino Ĝang Min .....	13
Rompo kun malnovaj tradiciaj ideoj .....	15
Tertremo ne povas skui firman volon de la homoj.....	19
Sekretario de la partia komitato Van Hjuegian.....	23
Printempo venis al la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo.....	27
Ĉu kritiko kontraŭ Konfucio estas "pereigi la ĉinan tradi- cian kulturon"? .....	31
Alflugis montagloj .....	34
Parencoj de Norman Bethune vizitis Ĉinion.....	38
Dung-nacieco .....	42
La ĉina flaŭro .....	45
"Kiel Ĉinio plibonigas laborprotektion?" .....	49



### Esperante Parolas

#### Radio Pekino

##### Al Eŭropo

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo
	4:00 — 4:30
GMT	Vendredo k Sabato
	2:00 — 2:30
Ondoj (m)	43 33 31

##### Al Japanio, Koreio

Pekina tempo	Sabato k Dimanĉo
	19:00 — 19:30
Ondoj (m)	47 40

##### Al Sudorienta Azio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo
	20:30 — 21:00
Ondoj (m)	30 25



Multaj loĝdomoj de laboristoj konstruiĝis ĉirkaŭ Suĝoŭ, kiuj plibeligis la antikvan urbon.

## Prosperas la


# Antikva Urbo Suĝoŭ

Suĝoŭ estas urbo apud Tajhu-lago kaj havas historion de pli ol 2.500 jaroj. Antaŭ la Liberiĝo Suĝoŭ estis tipa konsumata urbo servanta al la kuomintangaj reaciaj burokratoj, bienuloj kaj burĝoj. Tiam ĝi havis nur dekelkajn fabrikojn kaj la metifarejoj okupis 95 % de ĝiaj industriaj entreprenoj.

Post la Liberiĝo la socialisma revolucio akcelis la disvolviĝon de la produkto. Hodiaŭ Suĝoŭ jam havas iom pli ol 400 fabrikojn, inter kiuj ne nur troviĝas fabrikoj produktantaj ĉiutagajn bezonaĵojn sed ankaŭ modernaj entreprenoj de afinacio, elektroniko, mezuraparatoj kaj aliaj. Krome oni laŭplane faris reformon kaj konstruadon al la urbo, konstruis grandan nombron da loĝdomoj, larĝigis stratojn kaj renovigis la famajn antikvajn ĝardenojn. Ankaŭ la kultura, eduka kaj higiena aferoj ricevis rimarkindan disvolviĝon.

La Suĝoŭ-anoj harditaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio fariĝis pli viglaj kaj entuziasmaj, kaj nun brave marŝas antaŭen sur la socialisma vojo.

Laboristoj de la Suĝōu-a Fabriko de Kemiindustriaj Ekipaĵoj sin okupas per produktado. La produkta valoro de la fabriko du-oble plimultiĝis ol tiu antaŭ la kultura revolucio.





La Tria Fabriko de Optikaj Instrumentoj kaj Aparatoj en Suĝou estis malgranda fabriko. Sed ĝiaj laboristoj sukcesis elfari drato-elektrodan tranĉmaŝinon kun progresinta nivelo sinapogante sur siaj propraj fortoj. Jen laboristoj provas la maŝinon.



Novaj kaj malnovaj kadroj kaj laboristoj de Ĉangfeng-a Maŝinfabriko ĉe Suĝou interkonsiligas pri laboro.



Laboristo-instruisto donas lecion pri fiziko al lernantoj de la Sesa Mezlernejo de Suĝou.



Suĝou estas unu el la gravaj produktejoj de silkaĵoj en Ĉinio. En la lastaj jaroj multe kreskis la produktokvanto kaj specoj de silkaĵo, atlaso kaj gazo. Jen laboristino de iu silka fabriko laboras zorge.




La disvolviĝo de la socialisma ekonomio prosperigis la merkaton de Suĝou. Jen estas iu viand-vendejo en la urbo.



La Suĝou-a brodado estas unu el la famaj brodadoj en Ĉinio. Post la Liberigo konstante renoviĝis ĝiaj temoj kaj la brodmetodoj jam disvolviĝis ĝis pli ol 40. La foto montras un brodfarejon.





Delonge Suĝou estas renoma pro siaj belaj ĝardenoj. Ĝi ĥavas pli ol 100 ĝardenojn de diversaj grandecoj. Post renovigo ili nun jam fariĝis parkoj, kie la laborantaj popolanoj pasigas siajn feriajn tagojn. Jen estas Ĝuoĝeng-ĝardeno.

La agrikultura produkto en la antaŭurbo de Suĝou ricevis ĉiuf flankan disvolviĝon kaj la pomua produktokvanto de greno kreskis je du-oblo kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. Komunumanoj en la antaŭurbo laboras sur kolzkampo.



# Argilaj Skulptaĵoj



Ĝojo pro la riĉa rikolto



Trinkakvon al rikoltantoj



Rikolto



Tibetana sanitaristino

